


中國新道

EL POPOLA


CINIO











## INTER NI

Niaj legantoj skribis al ni por aĉeti brokaĵajn sakojn kaj insignojn memore al la 40-jara jubileo de EPC. Por faciligi la aĉeton ni donu jenajn detalaĵojn.

1. Estas kvar specoj da brokaĵaj sakoj. Ĉiu portas sur la fronto delikatan koloran desegnon kun forta nacieca karakterizaĵo (Vd. la dorskovrilon de la 5-a numero). Supre de la sako vidiĝas la literoj E, P kaj Ĉ kaj ĉinaj ideografiaĵoj “中國报道”.

2. La insigno-kompleto konsistas el pecoj ruĝa, verda kaj blua, ĉiu kun bildo de fluganta kolombo formita el la literoj E, P kaj Ĉ.

Brokaĵaj sakoj estas aĉeteb-laj, ĉiu kostas 15 usonajn dolarojn. Unu kompleto da insignoj — du usonajn dolarojn. Krome, haveblas ankaŭ la memor-kovérto (Vd. la 20-an paĝon de la 8-a numero). Ĝi kostas unu usonan dolaron. La dezirantoj sendu la pagon rekte al:

El Popola Ĉinio  
24 Baiwanzhuang Rd.  
P/A Bank of China (Head Office)  
P.O. Kesto 77  
Beijing, China 100037

La Red.




# ENHAVO

- 13 **Por disvolvi Pudong-regionon**  
 16 **Transloĝigo de 170 000 kampanoj**  
 6 Konstruado de verda "granda muro" laŭ marbordo  
 21 La urbo Longyan  
 40 Pentrado saĝigas la infanojn  
 20 **Zhou Chengming, eminenta kuracisto pri reŭmatoida artrito**  
 52 **SCĖNEJO KAJ EKRANO:**  
 Ekzota repertuaro "Transmaraj Moroj"  
 27 **POĖMO • KALIGRAFAJO • PENTRAJO:**  
 Pri "Veturo sur Monto"  
 30 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**  
**Pri la asekura konscio de ĉinoj**  
 47 **LA SUDA SILKA VOJO (17):**  
 Regiono Dianchi  
 45 Moroj de la jugura nacio  
 11 Drakboata konkurso sur Kunming-lago  
 32 Turisma karavano de "Verda Stelo" en Ĉinio  
 44 **AMUZOJ:**  
 Ĉina ŝako (10)  
 38 **MI KAJ ĈINIO:**

- Glora Ĉinio  
 Danko al Ĉinio  
 37 **LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:**  
 Mia aparta sento  
 18 **SUR NIA LIBROBRETO:**  
 Socihistoria panoramo de Ĉinio  
 —Pri *Ĉina Antologio (1919-1949)*  
 39 **ESP-NOVAĴOJ:**  
 26 **POR KOMENCANTOJ:**  
 La lasta premiito  
 4 **INTER NI:**  
 42 **KURANTAJ AFEROJ:**  
 36 Fiŝhoka konkurso inter ĉinaj kaj alilandaj eminentuloj  
**INTERNE DE LA KOVRILO:**  
 Lukto en ondoj  
 Foto de **Yuan Zengwei**  
 4 Ĉerizoj  
 Foto de **Wang Weimin**  
**SUR LA KOVRILO:**  
 Membroj de la Orienta Ensemblo prezentas meksikian dancon.  
**SUR LA DORSKOVRILO:**  
 [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]  
 Gardistoj kontraŭ marondegoj  
 de **Mariet (Nederlando)**  
 Akvomuelejo  
 de **Mariet (Nederlando)**

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Lanzhou
2. Dianbai-gubernio
3. Dongshan-gubernio
4. Longyan
5. Ŝanhajo
6. Qingdao
7. Qufu
8. Honghu
9. Jugur-nacia Aŭtonoma Gubernio Sunan





Kampširma forsto laū marbordo de Guangxi

Čemaraĵ kampoj protektataj de arboj






# Konstruado de verda "granda muro" laŭ marbordo

Teksto de **ZHENG ZHENJIE**  
Fotoj de **SUN ZHIJIANG**

Vilaĝo en verdaĵo





Kampŝirma forsto ŝirmas fiŝboatojn.

**A**LIA grandskala ekologia plantado de kampŝirma forsto laŭ ĉina marbordo komenciĝis post la plantado de kampŝirmaj forstoj en nordorienta, norda kaj nordokcidenta Ĉinio.

Ĉinio havas 18 000 km da marborda linio, kiu komenciĝas de la enfluejo de Yalu-rivero en Liaoning-provinco en nordo kaj finiĝas per la enfluejo de Beilun-rivero de la Guangxi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono en sudo, tra preskaŭ 200 gubernioj kaj urboj de jenaj provincoj, municipoj kaj aŭtonoma regiono: Liaoning, Hebei, Tianjin, Shandong, Jiangsu, Ŝanhajo, Zhejiang, Fujian, Guangdong kaj Guangxi, kun totala areo de 25.1 milionoj da hektaroj, inter kiuj troviĝas 12 insulaj gubernioj kun areo de 360 000 hektaroj.

La marbordaj regionoj havas tropikan, subtropikan kaj mezvarman zonojn, kun favoraj naturaj kondiĉoj kaj abundaj naturaj riĉfontoj, konataj kiel lokoj riĉaj je fiŝoj kaj rizo kaj pordoj malfermitaj al la mondo. Tamen,

tie estas limo de maro kaj kontinento kaj kaprica klimato, tial la regionoj ofte suferas de tajfuno, pluvego, inundo kaj sabla vento. Laŭ statistiko, tio ĉiujare kaŭzas ekonomian perdon de pli ol 2.9 miliardoj da juanoj, endangerigante la vivon kaj damaĝante la havaĵon de la lokanoj. Tial starigi verdan ekranon laŭ marbordo estas granda plano por plibonigi la ekologian medion de la regionoj, protekti iliajn riĉfontojn kaj krei bonan medion por altiri eksterlandajn kapitalon kaj teknikon, disvolvi turismon kaj oftigi kontaktiĝon kun aliaj landoj.

En la 50-aj jaroj oni ekplantis arbojn en la ĉinaj marbordaj regionoj kontraŭ vento kaj sablo, sed estas malfacile starigi forston sur dunoj ĉe maro. En la komenco en plejparto de la sudaj marbordaj regionoj oni kutime plantis poplojn kaj salikojn, kiuj ne povas rezisti kontraŭ sekeco kaj alkalo. La trunkoj de tiaj arboj estas maldikaj kaj la radiketoj malmultaj kaj maldensaj, ke ili ne povas rezisti kontraŭ atako de ventego. Tial en la marbordaj re-

gionoj oni komencis kulturigi arbojn de nova speco kaj akiris certan efikon. Ekz. la forsto-sciencia instituto de Dianbai-gubernio, Guangdong-provinco, plantis multajn specojn da arboj por fari selektadon sur plaĝo de Bohe-subdistrikto de Dianbai-gubernio. Post pli-ol-unu-jara selektado oni fine elektis kasuarinon (*Casuarina equisetifolia*), kiu povas kreski eĉ sub tre malbonaj kondiĉoj, kaj disvastigis ĝin en la tuta gubernio. Tiam Chen Jiao, junulino de Bohe-subdistrikto, tutlanda labormodelo, la unua gvidis aron da junulinoj planti kasuarinojn sur sabloventa zono de ĉ. 20 km en la subdistrikto. Post 4-jara klopodado ili fine sukcesis planti en Guangdong-provinco la unuan marbordan kampŝirman forston, kiu ja estas embrio de la verda granda muro en suda Ĉinio.

Post nelonge kasuarinoj estis vaste plantitaj ankaŭ en la marborda regiono de suda Ĉinio. Samtempe en la marborda regiono de norda Ĉinio oni kulturis arbojn konvenajn al la loko, kiel



nigra kaj purpura sofraroj kaj robinio. Tio antaŭenpuŝis la plantadon de kampŝirmaj forstoj en aliaj marbordaj regionoj.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj en la marbordaj regionoj, landinterno kaj sur la insuloj de Ĉinio oni plantis 4 267 000 hektarojn da forstoj kampŝirmaj, materialaj, ekonomiaj, porhejtaj kaj pejzaĝaj, samtempe en 1 333 000 hektaroj da kampoj en la marbordaj regionoj oni faris kampŝirman forstoreton. La verda "granda muro" konsistanta el tiuj kampŝirmaj forstoj jam havas efikojn ekologian, socian kaj ekonomian.

En la lastaj jaroj, kiel enketis koncerna ŝtata departemento, en iuj lokoj, kie fundamente formiĝis sistemo de marborda kampŝirma forsto, malaperis aŭ malofitiĝis la fenomeno, ke mara vento furiozas, sablo kovras la sunon kaj glutas vilaĝojn kaj kampojn, la procento de klinitaj plantoj malpliĝis je 70% kompare kun tiu en la senforstaj regionoj, la produktokvanto de rizo kreskis je pli ol 15% kaj la procento de fruktoj falintaj de la arboj malpliĝis je 60%. Precipe en la regionoj atakataj de tajfuno la efiko de forstozonoj estas pli evidenta. En la jarcento antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, en Dongshan-gubernio de Fujian-provinco dekoj da vilaĝoj estis englutitaj de sablo, grandaj pecoj da kampoj ruinigitaj kaj multaj homoj devigite migris al alia lando. Nun la gubernio havas 6 267 hektarojn da forstoj, 39.5% de ĝia areo estas kovritaj de arboj, la totala produktokvanto de greno, la totala produktov valoro de agrikulturo kaj la pokapa enspezo 5-oble kreskis kompare kun tiuj antaŭ la forstumado en 1958. Nun la longo de la marbordaj kampŝirmaj forstoj en Guangdong-provinco okupas 71% de la totala longo de la forstumebla marbordo de la provinco. El la marbordaj provincoj Guangdong staras plej antaŭe ĉu en plantado de kampŝirmaj for-

stoj laŭ marbordo, ĉu en rapideco de forstumado kaj areo de forstoj en la interna terparto.

Longa estas la periodo de forstokulturo, kaj malalta la ekonomia efiko, precipe en plantado de marborda kampŝirma forsto, la maturiĝo de rapidkreska forsto bezonas eĉ 15-20 jarojn. En la lastaj jaroj nemalmultaj marbordaj regionoj sin liberigis de la tradicia koncepto pri forsto. Ili racie aranĝis la plantadon de ekonomiaj arboj kaj kampŝirmaj forstoj. Ekz. antaŭe sur Yuhuan-insulo de Zhejiang-provinco oni plantis pampelmusarbojn, kies fruktoj estas grandaj, sukoriĉaj kaj dolĉe acidaj. Sed la fruktoj facile falas je atako de ventego. La lokanoj plantis kasuarinojn ĉirkaŭ la pampelmusarbojn, ke ĉiu kvadrata interspaco de forstoreto kovru 2-3 hektarojn. Tio efikas bone. Nun pampelmusarboj kreskas en areo de preskaŭ cent hektaroj. Sur Zhoushan, la plej granda insulo de la provinco, estas plantitaj pli ol 2 000 hektaroj da prunarboj, mirikoj, oranĝarboj, persikarboj, eribotriarboj kaj aliaj bonspecaj fruktarboj. Krome, rapide disvolviĝas

ankaŭ tearboj, palmoj, uruŝioj kaj aliaj ekonomiaj arboj. Oni vidis profita la plantadon de arboj, tial oni plantis tiom da "mondonaj" arboj.

Kvankam jam komenciĝis plantado de marbordaj kampŝirmaj forstoj, tamen pro manko de ĝenerala plano kaj kapitalo la laboro en tre multaj regionoj ankoraŭ restas sur la bazo de la 70-jaj jaroj.

Por rapidigi la marbordan forstokulturon kaj tuj plibonigi la naturan ekologian medion la Forstokultura Ministerio de Ĉinio laŭ la ŝtata Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) difinis sistemon de marbordaj kampŝirmaj forstoj kiel gravan tutlandan laboron por kampŝirmaj forstoj.

La tasko estas forstumi 3.55 milionojn da hektaroj. De 1989 ĝis 2000 etendiĝos la unua periodo de forstumado de 2.49 milionoj da hektaroj, kaj post tio la forstumita areo kreskos de 24.9% al 34.8%; la dua periodo etendiĝos inter 2000 kaj 2010, dume oni devos forstumi 1.06 milionojn da hektaroj. ■

Kokosarboj ĉe maro





Kampširma forsto sur Dachen-insulo



Makakoj en arbaro sur Hainan-insulo

Parto de la arbarizita urbo Zhanjiang







Intensa konkurso




"Imperiista edzino" ĝuas boat-konkurson.

# DRAKBOATA KONKURSO SUR KUNMING-LAGO

Teksto de LI QIANG  
Fotoj de LIU SIGONG

Tamburisto



Sur Kunming-lago





Antaŭen

**V**ARMA somero. En la Somera Palaco de Pekino. Sur la ĉielo pendas balonoj kaj flirtas koloraj flagoj. Sur la verda Kunming-lago konkuras drakboatoj. Direktate de la ritma tamtamado de la komandanto, la sportistoj energie remas. La boatoj sagrapide sin pafas antaŭen. Oni huraas ĉe la bordo de la lago, forte tamtamante. Kia spektaklo! Jen la Unua Drakboata Konkurso de Kunming-laga Pokalo. En la 36 tagoj 123 teamoj el 2 460 sportistoj faris 106 konkursojn, kiujn vizitis duono de miliono da rigardantoj.

Drakboata konkurso estas sporto ŝatata de diversnaciaj popoloj de Ĉinio. La 5-an de la kvina monato de ĉ. 277 a.K. laŭ la ĉina lunkalendaro granda ĉina poeto Qu Yuan dronis en Miluo-rivero (en la nuna Hunan-provinco) pro malespero, ke li ne povis realigi sian politikan idealon kaj savi sian patrujon el pereco. Por rememorigi pri li, ĉiujare oni kultas la grandan patrioton, remante en tiu ĉi tago, kio fariĝis nacia

tradicio kaj unu el la tri gravaj popolaj festoj — la Drakboata Festo. Ĝi originis en la sudo de Ĉinio kaj poste evoluis en sporton amuzan kaj konkuran. Antaŭ 300 jaroj la aktivado estis enkondukita en Japanion, Koreion kaj sudorientan Azion kaj multe ŝatata de la tieaj loĝantoj. En la lastaj jaroj la internacia drakboata konkurso plivigliĝis. En ĝi partoprenis ankaŭ sportistoj el Britio, Italio, Usono, Kanado kaj Aŭstralio. En 1984 la Ŝtata Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko difinis drakboatan konkurson kiel oficialan sportobranĉon kadre de Ĉinio kaj okazigis la Tutlandan Drakboatan Konkurson de Quayuan-pokalo. La Drakboata Konkurso de Kunminglaga Pokalo okazinta en la Somera Palaco estas la unua granda tia konkurso en norda Ĉinio.

La Somera Palaco estis imperiestra ĝardeno. Jam en 1588 imperiestro Zhu Yijun de Ming-dinastio ĉasis en drakboato sur Kunming-lago. Dum la regado de imperiestro Qianlong

(1736-1797 sur trono) sur la lago estis dekkelkaj drakboatoj destinitaj por la imperiestro kaj liaj edzinoj. La plej granda el ili estis ĉarma du-etaĝa boato, pli ol 40 m longa kaj 11 m larĝa. Ĝi, lukse meblita kaj dekoraciita, aspektis kiel surakva palaco. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio la imperiestra patrino Cixi some-rumis en la Somera Palaco kaj ofte veturis per speciala drakboato aŭ motorŝipo sur la lago.

Dum la konkurso estis spektaklo sur la lago, ke “imperiestro Guangxu” kaj “la imperiestra patrino Cixi” ĝuas drakboatan konkurson. Geaktoroj en antikvaj vestoj rolis kiel imperiestro, imperiestra patrino, imperiestra edzino kaj palacaj servistinoj kaj gardistoj, kiuj veturis en drakboatoj sur Kunming-lago. Tiam turistoj rigardis la spektaklon kaj faris fotadon. Grandaj drakboatoj faritaj laŭ antikva stilo iris sur la lago por porti la turistojn kaj faciligi ilian rigardadon de la konkurso kaj pejzaĝo de la ĝardeno. ■



# POR DISVOLVI PUDONG-REGIONON

de LU GUOYUAN

**E**N la 18-a de aprilo 1990, ĉefministro Li Peng de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, kiu inspektis en Ŝanhajo, oficiale publikigis, ke la Centra Komitato de la partio kaj la Ŝtata Konsilantaro aprobis la planon por disvolvi kaj malfermi Pudong-regionon kaj postulis, ke Ŝanhajo plene utiligu siajn superecojn, apogu sin sur la saĝo de la popolamasoj kaj peneme luktu por bone plenumi la taskon. Jen komenciĝis la laboro por efektivi la planon.

## ŜANHAJO DEFIATA


Kiel mondfama marborda urbo, Ŝanhajo malfermis brilan paĝon en sia disvolviĝo. Jam en la tridekaj jaroj Ŝanhajo estis la plej granda internacia komerca kaj financa centro de Azio. Tamen, ekzistis seriozaj mankoj en la malnovaj kvartaloj koncesiitaj al potencoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la bazaj ekipaĵoj de Ŝanhajo pli kaj pli ne konformis al la disvolviĝo de ekonomia konstruado. La troloĝateco, densa koncentro de konstruaĵoj, troa vicleco de trafiko, neracia industria dispozicio kaj serioza poluado, ĉio ĉi ege katenis la disvolviĝon de la urbo.


La reformo kaj pordomalfermo de Ĉinio plirapidigas la ekonomian disvolviĝon de Ĉinio kaj pli kaj pli intensa fariĝas konkuro en la enlanda merkato, ke Ŝanhajo alfrontas kreskantan defion. Aŭ plua malfortiĝo de la ekzistantaj superecoj, depresiĝo de la ekonomio kaj malaltiĝo de la ekon-

omia pozicio en la lando, aŭ plena disvolviĝo de la superecoj, pluaparta profundiĝo de la reformo, plivastigo de ekspluato kaj rapidigo de la disvolviĝo de la poreksporta ekonomio por denove vigligi la ekonomion de Ŝanhajo, jen alternativo por la urbo antaŭ la defio.

Post fojfoja diskutado, la magistrato de Ŝanhajo opinias, ke Ŝanhajo, kiel la plej granda ekonomia centro de Ĉinio kaj internacia urbo influhava en la okcidenta bordo de Pacifiko, havas superecojn en geografia pozicio, industrio, scienco, tekniko k.a. Ĉio ĉi montras, ke en la ekon-

PLANO DE PUDONG-REGIONO





La skemo de Nanpu-pontego super Huangpu-rivero

omia disvolviĝo, reformo kaj por-domalfermo en Ĉinio, Ŝanhajo devas iri antaŭ aliaj lokoj de la lando. En 1984 la magistrato oficiale prezentis la projekton por disvolvi Pudong.

## VIRGA TERO

Kiel arĝenta silkrubando, Huangpu-rivero dividas Ŝanhajon en la regionojn Pudong kaj Puxi. En pli ol unu jarcento post la apero de Ŝanhajo, ĝia disvolviĝo estis limigita en la regiono Puxi. Estis frapanta diferenco inter la regionoj. Unuflanke de la rivero estas prospera urbo kun sennombraj etaĝdomoj kaj aliflanke de ĝi sterniĝas kampvastaĵoj kun malaltaj konstruaĵoj. Huangpu-rivero, kiu nutras Ŝanhajon, kiel natura barilo malhelpas la kontaktigon inter Pudong kaj Puxi en la ekonomia disvolviĝo. Pudong estas triangula zono norde de Chuanyang-rivereto, oriente de Huangpu-rivero kaj okcidente kaj sude de la buŝo de Yangzi-rivero. Ĝi havas areon de ĉ. 350 kvadrataj kilometroj, kies plejparto distancas de la urbocentro je malpli ol 15 kilometroj. Ĝi dorse tuŝas Ŝanhajon kaj rigardas al Pacifiko, kun naturdotita geografia pozicio. Kaj plie, la regionon karesas printempa-somera musono. En ĝi regas freŝa aero tutjare. Tie ekzistas 1 930 entreprenoj, kun fiksa kapitalo de ĉ. kvar miliardoj da juanoj kaj jara produktovalor

de 10 miliardoj da juanoj. Ĉe la orienta bordo de Huangpu-rivero servas 27 ankeroj por 10 000-tonelaj ŝipoj kaj du transriveraj tuneloj.

Tamen, kompare kun la prospera urbocentro en Puxi, Pudong estas virga tero. Post esploro en la loko, alilanda fakulo diris: "Pudong estas trezora loko, ne facile trovebla en la mondo." Kiam ŝanhajanoj decidis konstrui en la komenco de la venonta jarcento la urbon en plej grandan ekonomian kaj komercan centron ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko, ili nature turnis la rigardon al la regiono Pudong.


## AMBICIA PLANO

Laŭ la strategia penso "Al la mondo, al la 21-a jarcento kaj al la modernigo", laŭ la ĝenerala plano de la regiono Pudong sankciita de la ĉina registaro kaj helpe de spertoj en konstruado de novaj distriktoj farita en urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj, oni planas en dekoj da jaroj konstrui Pudong en modernan urbon kun racia dispozicio, avangarda trafika reto, kompletigitaj bazaj ekipaĵoj,

oportuna komunika sistemo kaj ideala ekologia medio, por ke ĝi fariĝu nova fenestro de Ŝanhajo kaj eĉ de Ĉinio por malfermi la pordon pli larĝe al aliaj landoj kaj granda movforto por konstrui Ŝanhajon en plurfunkcian modernan urbon en la fino de la kuranta jarcento.

Laŭ projekto, la regiono Pudong konsistos el kvin sintezaj subregionoj sendependaj unu de alia kaj apartigitaj de kampoj kaj verda zono longaj 2-3 kilometrojn. Kaj ĉiu subregiono havas sian apartan punkton por disvolvi. Ekz., la Waigaoqiao-Gaoqiao-a Subregiono fariĝos granda moderna haveno. Surbaze de ĝi, oni konstruos eksportaĵan prilaborojn kaj investojn por alilandaj komercistoj kovrantajn ok kvadratajn kilometrojn, kun la celo disvolvi superajn eksportaĵojn produktitajn per avangarda tekniko. La Lujiazui-Huamu-a Subregiono sidas kontraŭ movoplana strato de Puxi trans la rivero kaj estos ora loko de Pudong. Tie disvolviĝos servaj okupoj, kiaj financo, negoco, komerco, informodono kaj konsultiĝo. La Beicai-Zhangjiang-a Subregiono disvolvos ĉefe altajn teknikojn kaj novajn industriojn.

La ĉina-brita vitra limigita kompanio fondita en Pudong





Laŭ la ĝenerala projekto kaj konsidere de la bezono de la disvolviĝo de ekonomio, kulturo, eduko kaj aliaj aferoj, la regiono Pudong havos modernan trafikajn sistemon el stratoj kun aŭta kaj bicikla koridoroj kaj subfervojoj, kiuj ligiĝos kun trafikaj linioj de Puxi. Laŭ projekto, super Huangpu-rivero estos konstruitaj 2-3 pontoj. La pontoj, 5-6 tuneloj, 5 pramejoj por veturiloj kaj 16 pasaĝeraj pramejoj kune konsistigos transriveran trafikajn sistemon. En la regiono Pudong oni konstruos subteran fervojon longan je 22 kilometroj, kiu ligiĝos kun la konstruata subtera fervojo en la urbocentro. Ankaŭ la havena kaj flughavena konstruado estas planita. Laŭ plano oni konstruos en Pudong la duan internacian flughavenon de Ŝanhajo.

La konstruado de Pudong devas esti laŭplane farita paŝon post paŝo. Ĝi efektiviĝos laŭ tri paŝoj: La unua paŝo estos la komenca periodo, kiu daŭros de 1990 ĝis 1995. La dua estos la ekspluatada periodo, kiu daŭros de 1996 ĝis 2000, kaj la tria estos la periodo de ĉiuflanka konstruado, kiu daŭros 20-30 jarojn aŭ pli longe post 2000.

## ENTUZIASMO AL LA KONSTRUADO DE PUDONG

La decido disvolvi Pudong-regionon vekis grandan entuziasmon de 12 milionoj da ŝanhajanoj.

La konstruado de Pudong bezonas grandan sumon da kapitalo, interalie, la investo por bazaj ekipaĵoj devas esti kelkdek miliardoj da juanoj. En la venontaj kvin jaroj la ŝtato asignos al Ŝanhajo 6.5 miliardojn da juanoj kiel fonduson por la komenca periodo. Ankaŭ la magistrato de Ŝanhajo devas akumuli certan monsumon por tio. Laŭ antaŭkalkulo, eblos ĉiujare pliigi investon de miliardo da juanoj. Krome, la konstruado postulos ankaŭ la subtenon de la loĝantoj. Informiĝinte pri tio, multaj ŝanhajanoj skribis al la magistrato por esprimi sian subtenon. Mezaĝulo Wang Depei venis al la akceptejo, elpoŝigis 500 juanojn kaj emocie diris: "Ne riĉa estas mia familio kaj mia edzino suferas de malsano, tamen, por subteni la konstruadon de Pudong mi donacas la monsumon."



Studentoj de la altlernejoj en Ŝanhajo entuziasme partoprenas en la konstruado de Pudong. La esplor-studentaj asocioj de la fa-

maj Fudan-universitato kaj Orient-Ĉinia Normala Universitato sendis peti la permeson, ke ili volontule helpos al la oficejo de la regiono Pudong akcepti alilandajn gastojn, kolekti informojn kaj plani la konstruadon.

Antaŭ nelonge la magistrato de Ŝanhajo publikigis la unuajn dek avantaĝajn politikojn kaj rimedojn praktikotajn en la regiono Pudong, kiuj altiris pli multajn komercistojn el aliaj landoj, Hongkong kaj Taiwan. Tiuj komercistoj esprimis sian deziron investi la konstruadon. Ĝis la unua de junio Ŝanhajo jam akceptis pli ol 600 grupojn da komercistoj el 20 landoj kaj regionoj. Ili investos por: laŭkontrakta ekspluatado de vasta tero kaj bienperado, inkluzive de la konstruado de bazaj ekipaĵoj; la konstruado de bazaj ekipaĵoj kadre de la tuta regiono, inkluzive de tiuj por trafiko, energio, flughaveno, haveno kaj kontenera transportado; la entreprenado de industriaj servoj; kaj la starigo de filioj de bankoj de iuj landoj kaj regionoj en Pudong.

Kvankam la konstruado de Pudong ĵus komenciĝis, tamen ĝia grandioza plano estas farita. La perspektivo de la nova Ŝanhajo prezentiĝos antaŭ niaj okuloj post nelonge. ■

Novaj loĝdomoj en Pudong



# Transloĝiĝo de 170 000 kamparanoj

de ZHENG ZHENJIE

**E**N la subprovinco Dingxi de Gansu-provinco kaj la suda parto de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono de nordokcidenta Ĉinio estas pli ol 7 milionoj da kamparanoj longe suferantaj de trosekeco. El ili 1.4 milionoj ankoraŭ ne havas sufiĉajn manĝaĵojn kaj vestojn. Laŭ plano de la ĉina registaro antaŭ la fino de la nuna jarcento 900 000 kamparanoj transloĝiĝos de ĉi tie al ebenaĵo, kie la irigaciaj kondiĉoj estas pli bonaj. De 1983 ĝis 1989 la totala nombro de la transloĝigintoj de tiuj du regionoj jam superis 320 000. Maje de 1990, veturinte de Lanzhou, la ĉefurbo de Gansu-provinco, mi vojaĝis mil km. por viziti transloĝigintojn.

## DINGXI — LA PLEJ MALRIĈA LOKO

Dingxi en la meza parto de Gansu-provinco, el 18 gubernioj kun 5.59 milionoj da loĝantoj, situas sur la Leŭsa Altebenaĵo. Ĝi kovras 70 000 kvadratajn kilometrojn.

Tie preskaŭ ĉio estas flava, escepte de kelkaj oazoj nutritaj de la Flava Rivero. Vojetoj formitaj de la tretado interkruciĝas sur montdeklivoj kelkdek kaj kelkcent metrojn altaj. Kamparanoj laboras sur krutaj deklivoj, kie eĉ bovo ne povas stari. Altaj montoj, krutaj deklivoj, trosekeco kaj ofta hajlado faris la lokon la plej malriĉa en la tuta lando jam en la 19-a jarcento.

Akvo estas unu el la nemankiĝeblaj kondiĉoj por la homa vivo, sed al la regiono Dingxi mankas akvo. Materialo montras, ke la to-

tala jara pluvokvanto de la 18 gubernioj de Dingxi estas malpli ol 400 mm, tamen la elvaporiga kvanto estas 1 500 mm. En vilaĝo, mi propraokule vidis, ke la vilaĝanoj prenas akvon ekskluzive el tri akvokonservejoj ĉiu kun kapacito de kelkaj kubmetroj. Sur montvojo iras aŭtoj kaj traktoroj, transportantaj akvon per kaŭĉukaj sakegoj de malproksime. Imagu, kian sekecon suferas la tieaj plantoj!

Laŭ la ĝenerala normo, ĉiu kvadrata kilometro da tero povas esti ŝarĝita de 7 kaj 20 homoj en la seka kaj duonseka regionoj respektive. Sed en Dingxi ĉiu kvadrata kilometro da tero estas ŝarĝita de 50 homoj. Interalie en Zhuanglang-gubernio la nombro estas 130. Por sin vivteni la tieaj homoj povas fari nenion alian, krom maksimume ekspluati la teron kaj aliajn naturajn riĉfontojn. Ili forhakis arbojn, forfosis herbojn, eĉ kies radikojn ili prenis kiel hejtajon. La kampoj rampas de val-fundo ĝis la montpinto. Rezulte de tio la trosekeco kaj grunda erozio farigis pli seriozaj.

Kie estas la elirejo de Dingxi?

Antaŭe la ĉina

registaro ĉiujare multe helpis la katastrofosuferantojn per greno, kotono kaj ŝtofo, sed de 1982 krom doni monhelpon ĝi ankaŭ kuraĝigas la kamparanojn al la fundamenta konstruado de la kampoj, kiaj restarigo de flaŭro kaj konstruado de agroj kaj novaj irigaciaj kampoj. La registaro difinis novan principon: konstrui irigacieblajn kampojn tie, kie ekzistas akvo, kaj sekajn kampojn tie, kie ne estas tia kondiĉo, kaj serĉi alian elirejon, se tie oni eĉ sekajn kampojn ne povas konstrui. Jen tiel aperis la grandskala transloĝiĝo.

Huj-naciaj transloĝigintoj sur draŝejo





## NOVA IRIGACIA REGIONO DE LA FLAVA RIVERO

Oficisto de la registaro de Gansu-provinco, kiu respondecas pri la transloĝigo, sciigis min, ke estas du metodoj por transloĝigo de loĝantoj. La unua — transloĝigi kamparanojn en la kadro de gubernio, t.e. transloĝigi ilin al irigacia regiono nove ekspluatita ĉe la Flava Rivero. Ĝis nun la nombro de la transloĝigintoj tie jam superis 140 000. La dua — transloĝigi kamparanojn al la regionoj Zhangye kaj Jiuquan de la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero, konata kiel trezora oazo en nordokcidenta Ĉinio. Tie la nombro de la transloĝigintoj estas 30 000.

Mi vizitis Xingbaozichuan de Jingyuan-gubernio, novan irigacian regionon de la Flava Rivero.

Pumpa konstruaĵo, alta kiel kvin-ses-etaĝa domo, staras ĉe la bordo de la Flava Rivero. Je 6 kubmetroj ĉiusekunde la akvo estas levita el la rivero al altebenejo, je 407.3 m. pli alta ol la akva surfaco. De tie komenciĝas la vojaĝo de la akvo laŭ la kanaloj kun totala longo de 230 km. La akvo irigacias pli ol 10 000 hektarojn da agroj nove ekspluatitaj, kie loĝas 51 000 transloĝigintoj. Tangzhuang ja estas nova vilaĝo kun 1 414 homoj venintaj el tri distriktoj de Jingyuan-gubernio. En 1986 ili forlasis sian hejmlokon kaj venis ĉi tien por konstrui pumpejon kaj fosi kanalojn. Post ekfunkcio de la pumpejo ili komencis ekspluati la kampojn, planti arbojn kaj konstrui vilaĝojn. Nun ĉiuj vilaĝanoj enloĝiĝis en nova domo. Antaŭ ĉiu domo viciĝas popoloj. En la korto oni kultivas legomojn kaj fruktarkojn. Instruisto de la tiea elementa lernejo diris al mi, ke antaŭe la vilaĝanoj, loĝantaj en montregiono, havis nek manĝaĵon, nek hejtajon. Kiel ili povis klerigi siajn infanojn? Nun ili ne plu suferas de malsato. Duono de ili jam havas mantraktoron kaj aliajn agrikulturojn. Ili jam turnis sian atenton al kleriga investo.



Novaj domo kaj traktoro de transloĝinto

En kelkaj tagoj mi vizitis plurajn loĝpunktojn de transloĝigintoj. Ĉe tritika kampo mi interparolis kun transloĝigintoj, irigaciantaj aŭ ŝprucigantaj insekticidon, aŭ sidantaj en domo sur nove masonita terlito, atente aŭskultis tristan historion pri la pasinteco en ilia hejmloko.

La nova irigacia regiono de la Flava Rivero ludas sian rolon en solvo de la bazaj vivkondiĉoj de malriĉaj regionoj. La plejparto de la transloĝigintoj jam solvis malfacilojn en manĝaĵoj kaj vestoj en la tria jaro post sia transloĝigo kaj komencis riĉiĝi en la kvara jaro.

Nun jam aperis 6 novaj irigaciaj regionoj, kia Xingbaozichuan, laŭ la bordo de la Flava Rivero en Dingxi-subprovinco. El ili la plej fama estas la Jingtai-chuan-a Irigacia Regiono, por kies unua periodo la ŝtato investis 478 milionojn da juanoj. Nun ĝi irigacias 20 000 hektarojn da kampoj kaj transloĝiĝis ĉi tien 64 000 kamparanoj. La vicestro de Jingtai-gubernio Tan Jiayan diris al mi, ke la dua ŝtupo de la irigacia regiono ja parte funkcias kaj tie fiksloĝiĝis 14 000 transloĝigintoj. En tiu irigacia regiono la transloĝigintoj konsistigas duonon de la tuta vilaĝa loĝantaro. En 1992, kiam la Jingtai-chuan-a Irigacia Regiono komplete funkcios, transloĝigos plie 72 000 homoj kaj

tiam la gubernio fariĝos vera gubernio de transloĝigintoj.

### TRANSLOĜIGO AL LA OKCIDENTA KORIDORO DE LA FLAVA RIVERO

Forlasinte Dingxi, mi venis al la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero.

Norde de la koridoro sterniĝas dezerta Gobio. Sude de ĝi zigzagas eterne neĝkovrita alta Qilian-montaro. La koridoro situas inter la montaro kaj dezerto. Ĝi estas ebena kun sennombraj padoj. La koridoro longa de okcidente orienten 1 200 km. estos unu el la grenproduktaj bazoj de Ĉinio. Precipe Zhangye en la meza parto de la koridoro kaj Jiuquan en ĝia okcidenta parto estas vastaj kaj subloĝataj. Tie estas 200 000 hektaroj da kampoj ekspluateblaj.

Mi intervjuis kelkajn transloĝigintojn en la gubernioj Jinta kaj Anxi de la koridoro. Li Yuping, 30-jara, estas unu el la plej frue transloĝigintaj en Jinta. Li akceptis min antaŭ sia konstruata domo kun ses ĉambroj. Li devenis de Dingxi, kie liaj prapatroj loĝis en kaverno. El siaj parencoj li estas la unua, kiu konstruas novan domon. Viŝante la koton sur la manoj, li honteme diris: "Estas ne bone loĝi en unu loko senŝanĝe. Mi kutimis vivi en mia hejmloko, kaj la tiea laboro ne estis tre laci-

(Datiĝo sur p. 26)

# Socihistoria panoramo de Ĉinio

## —Pri «Ĉina Antologio (1919-1949)»

de JÓZSEF KISS HORVÁTH (Hungario)

*Ĉina Antologio (1919-1949). Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1986. 21 cm., 602 p. Prezo: 21,00 gld., (Por Hungario: 380,-forintoj).*

Naciaj antologioj kaj reprezentaj kolektoj de prozo kaj aŭ poezio (ĉinaj, portugala, anglaj, japana, kroata, malta, slovaka, hungara, germana, itala) ĝojinde plipopiĝadas en la lastaj 20 jaroj. Ĉu signe de naciismo en la verda patrujo? Aŭ temas pri la maturiĝo de niaj kulturo kaj lingvo por vehiklado de tutecaj segmentoj de naciaj kulturoj kaj memfido transpasi la eksperimentadon per tradukado de unuopaj pintoverkoj? Aŭ pri la elkresko de legantaro kun alta nivelo de lingvoscio, kapabla kaj emiga al arta ĝuado kaj aĉeto de librodikaĵoj? Iel ajn estu, ties fruktoj faladas en la sinon de la Zamenhof-anaro.

La ĉinoj eldonis en 1959 la unuan serieron — Ĉina Antologio 1949-1959 — de poliptiĥono, kiu promesas prezenti la tutan ĉinan literaturon ekde la ĝermoj ĝis la okdekaj jaroj (ĉi lasta jamas preparata). Laboro gratulinda kaj parto de kultura kampanjo, pribatalata per albumoj, historiaj libroj, sciencaj eldonaĵoj, infanlibroj, per kiuj la ĉinoj certe predigos niajn korojn. Ke ankaŭ aliaj popoloj same bravu!

La tridek jaroj inter 1919 kaj 1949, kiujn la antologio brakumas, estas notataj inter la plej ŝtormaj de la ĉina historio. Ili estas jaroj de longa akuŝo de la nova socio, malkonstruiĝo de la tradicia morala kaj mora ordoj, pena nasko de novaj valoroj. Ĝin


etikedas eventoj, kiel la Movado de la 4-a de Majo — kun strikoj, popolaj tumultoj, politikaj vorticoj —, naciliberigaj, revoluciaj militoj inter 1925-27, agraraj revoluciaj militoj kaj la Longa Marŝo inter 1937-45 kaj eksplodo de la popola liberiga milito kontraŭ Kuomintang, flagranta ĝis la fondo de la popolrespubliko en 1949.

Ne nur la socio, sed ankaŭ la literaturo tute transformiĝas en tiu epoko: ĝi ekkonas kaj uzas preskaŭ ekskluzive okcidentajn literaturajn ĝenrojn kaj formojn — la leganto ne serĉu do formojn, ekzotikajn por eŭropaj okuloj. La reganta ĝenro iĝas la prozo, ne hazarde do, ke rakontoj okupas la pliparton de la volumo.

La sombra epoko respeguliĝas en sombre agorditaj noveloj. Sed sur la nigregriza socia fono teksiĝas bunte variaj sortofadenoj kaj figuroj. En la novelo de Lusin "Kong Jiĝi" ekzemple, la deklasiĝinta intelektulo devas ŝteli, pro la punaj policaj bastonbatoj lia kruro, lasta eblo por perlabori, rompiĝas kaj li malsatmortas. Simbolan enhavon montras la alia Lusinaĵo, "La Taglibro de Frenezulo": la protagonisto sentas vivi inter kanibaloj, kiel ethomo sendefenda en malamika socio. En

la novelo de Ŝen Cong'uen edzo sendas sian novedzinon en urbon por prostituigo pro manko de vivrimedoj vilaĝe ("Edzo"). En la raportaĵo de Ŝja Jan "Plendungitaj Laboristinoj" junulinoj devas submeti sin al triobla ekspluatado en ŝpinejo de fremdlandano, "luigite" de ĉinaj submastroj kaj vendite de la gepatroj por tri jaroj da servuteco. En la katenoj de rigoraj moroj kaj tradicioj cetere bonhavaj geedzoj ne povas pagi por la multekostaj ceremoniaĵoj pro forreŝto de mense daĵo de sia filo kaj humiliĝas en la tradici-tena socio (Ŭang Lujan: "Oro"). Kelkaj titoloj parolas per si mem: "Ĉagreno pro riĉa rikolto", "Sklava patrino", "Malhumanismo", "Animmortiga Lanco".

La sociofonan tenebron tamen traglimadas la lumo de espero, kredo pri prospero, solidareco: Ju Dafu skribas pri du gejunuloj en profunda mizero, kiuj ekvidas en la alia la "Dian fajreron", trovas





sencon por sia vivo ("En la Nokto, kiam Printempa Zefiro Ebriigis"). La "Frenezulo" de Lusin resaniĝas, la prostituata edzino hejmeniras. Aŭ gejunuloj mem elektas sian parulon spite al la malnovaj rigoraj moroj en la novelo "Ĝojiga Afero" de Ŝji Jong, verkita en 1948 en liberigita tereno kaj tonita en la nova, pli simpla, popolekskema stilo.

Se la noveloj estas detaleme preciza priskribo, panoramo de la ĉina socio, la poemoj estas ĝia verba voĉaro. Ili veas, plendas, alvokas, entuziasmigas kaj movas al agoj. Jen kelkaj "parolantaj" titoloj: "Karbo en la Forno. Sapiro al la Patrolando", "Mi Amas Ĉi Teron", "Libera Geedziĝo". Kelkaj versoj memorigas min pri la patriota ardo de Sándor Petőfi:

*"do mian bruston disŝiras  
manoj de flamar'  
animo putra lasiĝas ĉe river'  
en mi jam kred' pri renaskiĝo  
de l' homar'.  
(Aj Ĉing: "Suno")*

Ŭen Jidūo skribas pri la "Stagna Akvo", simbolanta Ĉinion:

*"Prefere ekspluatu ĝin la turpo —  
ni vidu, kio estos post perturbo."*

La versoj de Jin Fu sonas kvazaŭ konataj al hungaraj oreloj:

*"Ne domaĝu la mortintojn!  
Sang' ilia ne elfluis vane,  
ni ne devas tristi nek suspiri.  
Longa voj' atendas nin rikane.  
Nun antaŭen!"*

en "Pluvo" de Daj Ŭangŝu aŭ "Adiaŭ, Kembrigo" de Ŝju Ĝimo.

Krom poemoj, la volumo vicigas 37 novelojn, 5 eseojn de pli beletra ol publika tono kaj 1 raportajn similstilan. Fragmentoj el romanoj kaj dramoj plendinde ne trovis spacon; mi sentas neproporciaj ankaŭ la nurajn 12 versaĵojn, neniel riproĉeblajn kiel longa artospeco. Librofine troviĝas koncizaj biografiaj notoj, ekskludantaj — iom nekompreneble — du aŭtorojn: Ŝen Cong'ŭen kaj Feng Ŭenbing. Tio des pli stranga, ĉar cetere la ĉinaj samideanoj faris sian laboron ege konsciencie. Inter la aŭtoroj mi trovis ankaŭ la esperantiston Ŭang Lujan, helpanton de Eroŝenko dum lia restado en Ĉinio.

La belan pakumon pliplaĉigas 15 nigreblankaj tutpaĝaj ilustraĵoj, trafe elektitaj kaj tre artismaj kaj belaj verkofinaj flordekoroj. Mi sentis manko la mallongan enkondukon, ol kiu oni ne povus pli vortŝpari pri karakterizado de epoko kaj ties literaturo. Konsilindus plia orientado de la leganto, ja ne tro informita probable pri la ĉinaj cirkonstancoj.

La stilo de la tradukoj montriĝas nekutime unueca, klasike ekvilibrata kaj klara — kvazaŭ ĝi surhavis la rebonigan tuŝon de unu persono, kvankam ili estas poluritaj de pluraj (Laŭlum, Ŭang Ŝijong, Geoffrey Sutton ktp.). Inter la 28 tradukintoj troviĝas atutoj, kiel Elpin, Venlo Fon, S. J. See, Pandiŝo, Honfan ktp. Preskaŭ tute forestas sinplaĉigaj superfluaĵoj kaj memcelaj bravumadoj per lingvaj formoj. La gramatika, ortografia kaj tipografia senerareco preskaŭ centprocentas. La recenzanto havas facilan konsciencan rekomendante la Ĉinan Antologion 1919-1949, enskribiĝintan cetere jam en 1987 en la furorliston.

El «Hungara Vivo»

LIU ZHIDA:

## Zhou Chengming, eminenta kuracisto pri reŭmatoida artrito

**R**EŬMATOIDA artrito estas maligna malsano. Suferanto de tiu malsano sentas doloron komence ĉe unu aŭ du artikoj kaj iom post iom ĉe la tuta korpo. Liaj artikoj eĉ ŝvelas kaj misformiĝas. La manoj kaj piedoj de grava paciento kuntiriĝas, liaj muskoloj kontrahiĝas, liaj fingroj fariĝas kiel naveto kaj genuoj kiel tuiĝo de gruo. Kun korpo rigida li

devas ĉiutage kuŝi sur lito. Kiel paralizulo li ne povas prizorgi sin mem. La membroj de paralizulo estas sensentaj, dum la artikoj de paciento de reŭmatoida artrito doloras lin ĝis medolo.

Generale kuracisto de la ĉina medicino kuracas tian pacieron kiel paralizulon per forigo de malvarmo kaj malsekeco. Kuracisto de la okcidenta medicino

kuracas tian malsanulon per kontraŭinflama kaj sendoloriga medikamentoj, ekz. aspirino kaj glukokortika hormono. Nun ambaŭ kurac-metodoj ne estas idealaj.

Post multjara esplorado, en kunlaboro kun siaj kolegoj, Zhou Chengming, kuracisto de la Ĉin-medicina Hospitalo de la urbo Honghu de Hubei-



Kuracisto Zhou Chengming kaj paciento

provinco, elfaris serion da medikamentoj kun tripterigio (*Tripterygium wilfordii*) kiel la ĉefa ingredienco. Tiaj medikamentoj povas resanigi 96.7% de la suferantoj de reŭmatoida artrito. Pro tio li fariĝis eminenta kuracisto pri reŭmatoida artrito.

Antaŭ nelonge mi vojaĝis al Honghu por intervjui lin.

Li estas 71-jara, dika kaj sana, kun blanka barbo ĝis la brusto. Dum dekoj da jaroj li kuracis pacientojn per alta kurac-arto, tial la lokanoj multe laŭdis lin kaj intime nomas lin "Oĉjo Zhou".

Komence li kuracis iujn pacientojn de reŭmatoida artrito per tradicia kurac-metodo kaj popola sekreta recepto, tamen la efiko ne estis rimarkinda. En 1973 karboministo Wang Fujū venis de malproksime al la hospitalo por peti kuracadon. Li ne povis fleksi la korpon, nek levi la manojn, kaj liaj fingroartikoj fariĝis kiel naveto. Post diagnozo oni konstatis, ke li suferas reŭmatoidan artriton. Li estis kuracata en kelkaj grandaj ur-

boj, sed ne resaniĝis. Poste li informiĝis, ke Zhou Chengming estas tre lerta en kuracado, sekve li venis al Honghu. Zhou kuracis lin tri monatojn, tamen ne sukcesis resanigi lin. Ĉi tiu do luis loĝdomon, por ke Zhou povu konstante kuraci lin. Kaj Zhou esperis liberigi lin de la sufero.

Itutage Zhou vizitis leprulejon de la gubernio. Vidinte, ke kuracisto kuracas lepron per folioj de tripterigio, li intencis kuraci Wang Fujū per tripterigio, ĉar simptomo de lepro iom similas al tiu de reŭmatoida artrito.

Tripterigio estas tre venena. Ĝenerale estas malpermesite uzi ĝin kiel perbuŝan medikamenton, tamen ekzistas escepto. Iu virino ne volis plu vivi pro longdaŭra haŭta ulcero en la tuta korpo kaj nebla resaniĝo. Ŝi kolektis radikojn de tripterigio kaj trinkis ilian dekoktaĵon, rezulte ŝi ne mortis, sed mirinde resaniĝis. Zhou Chengming vizitis la virinon kaj multe demandis ŝin pri la afero. Poste li decidis mem provi tian dekoktaĵon. Li dividis

tripterigian dozon en kvar partojn, ĉiufoje provis unu parton kaj samtempe observis ĝian reakcion kaj pliigis aŭ malpliigis la kvanton laŭ la cirkonstancoj. En la triafoja provo, post kiam li prenis la medikamenton, lin doloris la ventro. Li svenis kaj rekonsciigis post kvar horoj. Tamen tuj malaperis lia lumbalgio, kiu suferigis lin dum multaj jaroj. Li ĝojegis. En la sekvanta tago li konsilis al Wang Fujū preni tian medikamenton. Por sekureco li dividis tripterigian dekoktaĵon en du glasojn. Ili prenis po unu glason. Zhou eltrinkis la unua kaj diris al Wang: "Trinku tiom kiom mi konsilas, sed ne pli multe, alie vi endanĝerigos." Laŭ lia konsilo Wang prenis la tizanon duonmonaton kaj post tio povis piediri, kaj post kelkaj monatoj li resaniĝis kaj revenis hejmen.


Tiel Zhou Chengming komencis kuraci reŭmatoidan artriton per tripterigio kaj studi pri kurac-efiko de tripterigio. Poste li kune kun siaj kolegoj faris tablojdojn, tinkturon kaj alkoholaĵon de tripterigio. Per tiuj medikamentoj kaj iuj helpaj terapioj li plialtigis sian nivelon de kuracado de reŭmatoida artrito. De post 1974 pli ol 100 000 pacientoj venis al la hospitalo por peti lian kuracadon. Iuj el ili enhospitaliĝis, sin apogante sur helpantoj aŭ portate de ĉaro, kaj fine ili ĉiuj resaniĝis; aliaj komence ne povis piediri pro la nefleksebleco de la artikoj kaj poste iom post iom forĵetis la lambastonon; kaj triaj ne povis vesti sin kaj preni manĝon kaj fine povas prizorgi sin mem.

Nun Zhou Chengming funkcias kiel vicdirektoro de la Ĉinmedicina Hospitalo de Honghu. Kvankam li aĝas pli ol 70 jarojn, tamen li ĉiutage akceptas klientojn. La hospitalo jam elkulturis aron da kuracistoj pri reŭmatoida artrito. ■



# La urbo Longyan

Teksto kaj fotoj de WEI LIAO




Parto de Longyan

En la Longyan-a Cigaredo-fabriko



La biciklo-produkta linio de la Hualong-a Maŝinfabriko



**E**N la hejmo de mia fratino en la urbo Longyan, preparinte teon, mi trankvile sidiĝis sur kanseĝon kaj prenis la aŭdilon. Post nur kelkaj sekundoj mi sukcesis rekte paroli kun la ĉefredaktoro de nia redakcio en Pekino.

Fininte la telefonadon, mi estis profunde emociita: Kiam Longyan, blokita monturbeto, en okcidento de Fujian-provinco, tiel irtime ekrilatis al la ekstera mondo?

## BLOKITA MONTURBO

En 1966, kiam mi aĝis 10 jarojn, trajno portis miajn gepatrojn kaj min de Ŝanhajo al Longyan. Tio estis granda transloĝiĝo de mia gepatra generacio por subteni la konstruadon de la monturbo Longyan. La fabriko kun miloj da oficistoj, laboristoj kaj iliaj familianoj transloĝiĝis de la granda urbo al mont-regiono. Ĝi nun nomiĝas la Longyan-a Tinkurteksta Fabriko.

Kiam la lokomotivo malrapide ekmoviĝis, antaŭ mi aperis kortuŝa sceno de adiaŭo: ĉiuj larmis, escepte de la infanoj. La trajno iris tri tagojn kaj tri noktojn por malpli ol 1 000 km. Dum la vojaĝo ni tranoktis en iu malgranda stacio por preni alian trajnon.

En Longyan, post nelonge la grandaj montoj tedis al mi, kiu neniam vidis monton. Mi subite komprenis, kial oni larmis ĉe la

adiaŭo. Kaj ankaŭ mia koro fariĝis peza.

Tiam Longyan estis povra guberni-urbeto kun areo de nur 1 kvadrata kilometro. La ĉirkaŭaj montoj malhelpis preskaŭ ĉiujn ĝiajn rilatojn kun la ekstera mondo. En ĝi troviĝis nur unu difektita strato, nome Zhongshan-strato, kie ĉie vidiĝis rubo kaj ŝvebis polvo...

Tiam, estis malfacile telefoni eĉ interne de la urbeto. Oni diris, ke la tiam uzataj telefonioj estis postlasitaj de la komenca periodo de la 20-a jarcento. Mi bone memoras, ke en la oficejo de mia patro funkciis magneta telefono, kiu ofte perturbiĝis. Pro la afero urĝa, mia patro devis ofte persone bicikli kiel kuriero.

Tiam estis periodo, kiam la ŝanhajaj varoj furoris en Ĉinio, sed ili neniam vidiĝis en tiu blokita loko. Tiam en Longyan tute ne ekzistis moderna industrio, eĉ la bombonoj tie produktitaj havis strangan guston. Se iu donis al ni ŝanhajajn bombonojn, gustumante ilin, ni profunde sopiris al la hejmloko...

Ĝis 1978, kiam mi forlasis Longyan por lerni aliloke, la situacio ne multe ŝanĝiĝis.

## REFORMO EN LONGYAN

En 1978, la reforma tajdo balais la tutan Ĉinion. Ankaŭ Longyan,

monturbo kun 410 000 loĝantoj, senbrue malfermis sian pordon.

Longyan invitis al si pli ol 1 000 specialistojn kaj erudiciulojn por lerni de ili spertojn pri reformado, koni informojn pri la pordomalfermo kaj ensorbi la utilajn spertojn de Wenzhou, Suzhou kaj Shekou. Ankaŭ la urbaj gvidantoj, sciencistoj kaj teknikistoj iris al Pekino, Ŝanhajo, Shenzhen kaj aliaj lokoj por amikiĝi kun la tieaj altaj lernejoj kaj scienc-esploraj unuoj, kontrakti kun ili pri kuna investado, kunlaboro kaj enkonduko de ekipaĵoj. Dank' al la grandskala horizontala ekonomia kunlaboro, Longyan enkondukis pli ol 25 milionojn da juanoj, 250 talentulojn kaj kreis arojn da novaj, bonkvalitaj produktaĵoj. Krome la ekonomio de la tuta urbo jam havis certan skalon. Nun en la urbo funkcias 10 entreprenoj kun alilandaj kapitaloj de 1 420 500 usonaj dolaroj investitaj sole de eksterlandanoj aŭ investitaj kaj administrataj de ĉinoj kaj alilandanoj kune.

Delonge Longyan estas fama pro siaj "ora monto kaj arĝenta akvo". Ĝi abundas je naturaj riĉfontoj, kiaj arboj, bambuoj, rezino kaj giromitro. La rezervokvanto de karbo, fero, kalkoŝtono, rara tero kaj kaolino okupas la unuan aŭ duan lokon en la provinco. Pro ilia ekspluato, la tiea ekonomio certe vigliĝos senprecedence.

Nun Longyan havas 250 fabrikojn kaj minejojn, kaj 8 000 vilaĝajn entreprenojn. Dank' al ili, tie unuapaŝe formiĝis kompare kompleta industri-sistemo kun cigareda, karba, tekstila, metalurgia, mangaja kaj maŝina, konstrumateriala, kaj mina industrioj. En la pasinta jaro la totala industria kaj agrikultura produktovaloro de Longyan estis 330 milionoj da juanoj, t.e. trioble pli multe ol tiu en 1978; ankaŭ la jara urba financa enspezo superis cent milionojn da juanoj.

## KONSTRUADO DE LA URBO

Pro rapida disvolviĝo de la tiea

Promenejo





industria kaj agrikultura produktado, la tiea urba konstruado progresas tagon post tago. Precipe post 1984, kiam Longyan estis envicigita inter la 22 urboj kaj gubernioj malfermitaj al aliaj landoj, ĝi rapidigis siajn paŝojn en la urba konstruado. Laŭdire, ĝi ĉiujare elspezas ĉ. 10 milionojn da juanoj por la urba konstruado.


Ĉe la bordo de la rivero Longjin, kiu iras ĉirkaŭ la urbo, oni antaŭ nelonge konstruis Longchuan-ŝoseon 2 km. longan kaj 33 m. larĝan, dividitan en aŭtan, biciklan koridorojn kun trotuaroj. Ĉe la vojrandoj kreskas platanoj kaj robinioj. Tie estas florbedoj kaj ŝtonaj benkoj. Konstruante la novan ŝoseon, oni reformis kaj plilarĝigis 11 vojojn. Tial ne plu vidiĝas la stato, ke Longyan havis nur unu straton de antikve. Samtempe, en Longyan oni konstruis 6 novajn loĝkvartalojn kun areo de 450 000 kvadrataj metroj kaj kompleta serva instalaĵo, t.e. por elektro- kaj akvo-provizado, trafiko, sanprotektado, komerca reto k.a. Nun, la urba kvartalo jam kovras 17 kvadratajn kilometrojn kun 130 000 loĝantoj.

Kaj krome, la programrega interŝanĝo-ekipaĵo F-150 importita el Japanio oficiale ekfunkciis je la 11-a horo de la 19-a de aprilo de 1989. Tio signifas, ke la telekomunikado de Longyan jam atingis la internacian nivelon. Nuntempe, la tieaj loĝantoj povas telefoni hejme ne nur al Pekino kaj Ŝanhajo, sed ankaŭ al aliaj landoj. Nun, Longyan havas programregan telefonon kun 5 000 lineoj, kiu atingos 15 000 en la jarfino.

La telefonio produktita de Usono en 1901, uzata en Longyan antaŭe, nun estis ekspoziciata en muzeo de Pekino kiel historia objekto.

## PONTO TRANSPASANTA TEMPON

La ekonomia bazo de Longyan



S-ro Zhang Junhua

estu febla. Unu el la gravaj kialoj por ĝia nuna ekonomia impeto en mallonga tempo estas tio, ke Longyan dediĉis grandan atenton al la teknika reformado, t.e. stariĝi industriajn entreprenojn avangardajn en- kaj eksterlande, enkonduki teknikojn mondnivelajn kaj per la unuanivelaj teknikoj reformi la malnovajn entreprenojn, tiel ke realiĝis en mallonga tempo la granda impeto de disvolviĝo kaj ĝi atingis en- kaj eksterlandajn avangardajn nivelojn.

Antaŭe, la Longyan-a Cigaredo-fabrika malnove ekipita produktis nur malbonkvalitajn produktaĵojn, tiam ĝia teknologio estis tiu de la 40-aj jaroj en la mondo. Poste ĝi enkondukis avangardan ekipaĵon kun la nivelo de la 80-aj jaroj, ĝi en 4 jaroj faris tion, kion oni faris en 40 jaroj por la samspecaj entreprenoj de aliaj landoj. Nun ĝiaj 5-specaj produktaĵoj gajnis la titolon de bonkvalita produktaĵo premiita de la ŝtato, la Ministerio de Malpeza Industrio de Ĉinio kaj la provinco.

La Longyan-a Tinktur-teksta Fabriko translokita de Ŝanhajo, kiun mi konigis komence de la artikolo, importis el Svislando, FR Germanio, Japanio kaj aliaj landoj avangardajn prestinkturajn ekipaĵojn, tial nun ĝi produktas diversspecajn varojn de pli ol 200 normoj kaj ilin eksportas al

Aŭstralio kaj aliaj 5 landoj kaj regionoj.

Estas menciinde, ke dank' al la rapidega disvolviĝo de la loko, plejparto de la funkciuloj kaj laboristoj venintaj el Ŝanhajo tie vivas kaj laboras trankvile kaj kontente, kaj ne plu suferas de nostalgio. Nun prenu mian maljunan emeritan patron kiel ekzemplon. Mi plurfoje invitis lin al Pekino, sed li ĉiuforte reiris al Longyan restinte nur kelkajn monatojn ĉe mi. Pasintjare, la fabriko donis al li novan apartamenton, pro tio li ŝatas Longyan plie. Ĉe la foriro, li ĉiam diris al mi: "Mi havas multajn intimajn amikojn tie. Kaj plie, tie la vivkondiĉoj ne estas malpli bonaj ol tiuj en Pekino."

## PLI BRILOS LA ESTONTECO

Zhang Junhua, 53-jara urbestro, diplomito de la agronomia universitato kaj eksprezidanto de la agrokultura instituto de la urbo, emocie diris al mi, kiam mi intervjuis lin:

"Longyan estas trezora loko. Tie ĉi estas 4 gravaj faktoroj de la ekonomia disvolviĝo: riĉfontoj de energio, plantoj, tero kaj klimato. En Longyan kreskas ĉiuj, kiujn oni plantis. Ĉiuj malproksimvidaj personoj vidas ĝian belan perspektivon, ĉar ĝi estas forstejo kaj minejo, plej proksima al la marbordo en nia lando."

Urbestro Zhang diris al mi, ke oni ekkonstruos en la venonta jaro la Banliao-Montan Tunelon de Longyan al Xiamen kaj finkonstruos ĝin en 2 jaroj. "La tunelo ludos pli gravan rolon ol tiu de la programrega telefonio. En la estonteco de la haveno Xiamen al Longyan etendiĝos glata vojo kaj la kontenerkamionoj ne plu transiros montojn. Tio pli larĝe malfermos nian pardonon kaj sendube nia ekonomio disvolviĝos pli rapide."



Motorcikloj por pasaĝoj

Foiro



Nova loĝejo





Korto de loĝantoj



# La lasta premiito

Tio estas ordinara rakonto.

Varma manklakado anoncis la finiĝon de premiodona ceremonio. La ĉeestantoj foriris unuj post aliaj. La kunvenejo aspektis iom malorda. La ĝenerala direktoro kaj aliaj personuloj de la kompanio malsupreniris de la podio, ĉiuj kun kontenta mieno. Sur la vizaĝoj de la premiitoj legiĝis gajeco.

Nun estis ŝia vico suriri la podion. Ŝi demetis la ŝtopilon de la mikrofono, faldis la tablotukon, lavis la glasojn, deprenis la rubandon de super la podio kaj balais la kunvenejon.

Jam estis duono post la 22-a, kiam ŝi finis la taskon. Ekpluvegis, ĝuste kiam ŝi estis revenonta hejmen. Ŝi devis atendi en la deĵorejo de ses kvadrataj metroj.



Ŝi nomiĝas Ding Jie. Antaŭe ŝi estis kompetenta analizistino en laboratorio de kemiindustria kompanio. Ŝi estis ĉarma kaj kantis bele. Sed antaŭ kvin jaroj ŝi misfaris procedojn en eksperimentado kaj tio kaŭzis akcidenton, ke ŝiaj vizaĝoj kaj manoj brulvundiĝis. Sekve oni servigis ŝin en la kabineto de la kompanio, tiel ke ŝi fariĝis servistino tie.

Antaŭ la sesa matene ŝi devas purigi la akceptejon, kunvenejon kaj kabineton kaj poste

balai la ŝtuparon. Kiam gastoj venas, ŝi devas prezenti al ili teon kaj cigaredojn.

En la okuloj de aliuloj ŝia laboro estas malpeza, sed ŝi devas labori ĉiutage, de mateno ĝis nokto, tamen ŝi neniam plendas.

En tiu nokto ŝi malpacientiĝis pro longa atendado kaj biciklis hejmen malgraŭ la pluvego.

Ŝi ne venis labori la sekvan tagon, ankaŭ la trian tagon. Pasis jam tri tagoj, kaj neniu menciis ŝin. Kvankam oni laboris anstataŭ ŝi, tamen la sanaj manoj estis malpli diligentaj kaj lertaj ol ŝiaj kriplaj. Estas elokventa pruvo, ke la ŝtuparo tre malpura ne estis balaita dum pluraj tagoj. Matene la ĝenerala direktoro ion piedtuŝis kaj preskaŭ falis malsupren laŭ la ŝtuparo. Tuj antaŭ eksplodo de kolero li ekpensis: "Neniam ŝi forestis, ĉu ŝi..." Enirinte en la kabineton, li tuj ordonis al la sekretario: "Tuj preparu laŭdateston kaj premion kaj alvoku eminentan kuraciston, ni iru rigardi ŝin..." ■

(Daturigo de p.17)

ga. Sed mankis manĝaĵoj kaj vestoj. Mi estis maltrankvila ĉe la komenco post mia transloĝiĝo. Sed pasis malpli ol tri jaroj, mi trankviliĝis. Por domkonstruado al mi mankis mono. Samvilaĝanoj pruntis al mi lignon. Krome la ŝtato donis al ĉiu transloĝiĝinto 300 juanojn. Mia familio estas kvar-membra, do mi ricevis entute 1 200 juanojn. Per ili mi povas ĝenerale kovri la elspezon en la domkonstruado. Sed fakte logi bone aŭ malpli ne estas grave. Plej grave estas ke mi ne plu maltrankviliĝas pri manĝaĵoj."

La pli-ol-60-jara maljunulo Li Zhiquan, veninta de Lijiapingvilaĝo de Huining-gubernio, an-

taŭe havis nek sufiĉajn manĝaĵojn nek vestojn. Mi vizitis lian hejmlokon kaj propraokule vidis pezajn paŝojn de maljunulo, kiu kondukis azenĉaron kun akvo, kaj la tristajn okulojn de plugantoj pro manko de pluvo. Tial, kiam mi sidis sur terlito de la nova domo de la maljunulo vizaĝo kontraŭ vizaĝo al li, mi havis ian neesprimeblan senton. En 1986, post longa pripensado la maljunulo decidis forlasi sian hejmlokon kaj kune kun siaj kvin familianoj venis ĉi tien portante unu sarkilon kaj unu manĝkorbon. Dank' al la peniga laboro de la tuta familio li rikoltis de 1987 ĝis 1989 sume 23 000 kg da grenoj. Li vendis al la ŝtato 10 500 kg. En 1989 lia familio enspezis 9 600 juanojn.

Nun li jam konstruigis por sia familio domon kun ok ĉambroj, aĉetis man-traktoron, rikoltmaŝinon kaj maiz-semilon. "Nun mi deziras koloran televidilon", ridete diris al mi la maljunulo.

Transloĝiĝo de kamparanoj el la malriĉaj montregionoj de Dingxi mildigis la troloĝatecon de la loko. Tio ebligas al la lokanoj planti arbojn kaj herbojn kaj disvolvi brutbredadon, tiel ke la vivo de la netransloĝiĝintoj pliboniĝis. Handiancun-vilaĝo de Zhuanglang-gubernio antaŭe havis 314 vilaĝanojn kun 0.29 hektaro da agro pokape. De 1985 111 vilaĝanoj transloĝiĝis al la Okcidenta Koridoro. Nun la pokapa agro de la restantaj vilaĝanoj kreskis al 0.45 hektaro. En 1989 la pokapa grena produktokvanto estis 399 kg, pli multe ol tiu en 1984 je 138 kg. ■



# PRI “VETURO SUR MONTO”

de TANG XI

*Foren kondukas sur aŭtuna  
monto vojoj ŝtonaj,  
Sub leviganta nubo kaŝas  
sin loĝejoj homaj.  
Halto ĉe acerar' pro ĝia ĉarm'  
en sunrebrilo,  
Ties folioj ruĝas pli ol floroj  
frusezonaj.*  
(verkita de Du Mu)


Du Mu (803 — ĉ. 852 p.K.) estis fama poeto en la lasta periodo de Tang-dinastio. Liaj klasikaj poemoj pri politiko kaj socio elspiras bravecon, justecon kaj heroecon, kaj liaj lirikaj versaĵoj profundajn signifojn kaj riĉajn sentojn. “Veturo sur Monto” estas unu el liaj karakterizaj verkoj.

La poemo priskribas belan aŭtunan montarbaron. Vojeto serpentumas al montpinto. Veturante sur la vojeto, la aŭtoro rigardas supren kaj trovas inter blankaj nuboj ŝtonajn dometojn. Sed la plej plezura vidaĵo estas aceraroj sternigantaj sur la monto, kiuj retenis la poeton. Skribante pri ruĝaj aceroj, la poeto eltuĉis vivplenan aŭtunon, kiu impresas per la spirito de brava strebado.

La pentraĵo por “Veturo sur Monto” estas verko de juna pentristo Yue Qianshan. Li faras pejzaĝajn pentraĵojn ne nur per la tradiciaj manieroj, sed ankaŭ per sia propra. Sur la monto nigre tuĉita estas ruĝaj punktoj prezentantaj la acerojn pli ruĝajn ol floroj en printempo.

Lü Ruxiong, mezaĝa kaligrafo, estas sukcesinto en sia ŝatokupo. Li multe studis pri steleaj gravuraĵoj el Han-dinastio.


Kaligrafajo de Lü Ruxiong



唐成杜牧的行詩意  
不似真深然山畫於北京西部







Pentrajo farita de Yue Qianshan por la poemo

# Pri la asekura konscio de ĉinoj

de GU ZHONGXIAN

**A**SEKURO estas enigmo por multaj ĉinoj.

Iu patrino asekuris sian infaneton, sed ŝi nuligis la asekuron en la sekva tago. Oni demandis ŝin pri la kialo. Ŝi respondis, ke reveninte hejmen, ŝi estis riproĉita de sia bopatrino, kiu asertis, ke la asekuro signifas alporti malfeliĉon al ŝia nepo.

Antaŭ du jaroj sufiĉe granda nombro da homoj en la ĉina kamparo, kiu jam eniris komercaĵan socion, ankoraŭ opiniis premiumon "asekura imposto". Estis pli ridinde, ke klientoj ofte demandis per telefono asekurajn kompaniojn pri la mezuro kaj prezo de sekursranko.

Julie de 1986, asekura konsultiĝa servo en movoplana kvartalo de Pekino altiris al si multe da pasantoj per okulfrapaj sloganoj kaj ritmoforta muziko. Kelkaj junuloj en modaj vestoj ridis tra la nazo kontraŭ la homamasoj:

"Kiaj stultuloj!"

Iun tagon de julio 1981, direktoro de la Chaoyang-distrikta Asekura Kompanio de Pekino vizitis estron de iu entrepreno por pligrandigi sian servon. Antaŭe laboranto de la kompanio vizitis lin plurfoje por la sama celo. Tamen ilian penadon rekompencis neniu sukceso, ĉar la entrepreno ne volis elspezi "pagon ne certe kompensitan".

Nun en la mondo sufiĉe rimarkeble disvolviĝas la asekura afero. La sumo de premio en 1986 atingis 500 miliardojn da usonaj dolaroj, kiuj konsistigis pli ol 5% de la totala nacia produktovaloro de ĉiuj landoj. En libro pri la okcidentaj financaj rondoj legiĝas: Kiam oni eniras evoluantan urbon de la Okcidento, oni unue vidos senescepte sur la horizonto la domegon de asekuro aŭ tiun de banko.

Tamen, okazis ja io simila, kio

estas menciita en la komenco de tiu ĉi artikolo. Eĉ antaŭ kelkaj jaroj asekuro estis nova koncepto por la plejmulto da ĉinoj.

Fakte, la asekura afero de Ĉinio havas longan historion. Sur la ĉina teritorio la unua asekura kompanio estis la Bao'an-a Asekura Kompanio funkciigata de anglo en 1835, en Hongkongo. Post 50 jaroj oni asignis 200 000 taelojn da argento por funkciigi la Asekuran Kompanion Renjihe en Ŝanhajo, la unuan kompanion de la ĉina nacia kapitalo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la asekura afero de Ĉinio faris gravan kontribuon por restaŭri kaj disvolvi la nacian ekonomion. Ĝis 1958 la lando pagis sume 380 milionojn da juanoj kiel kompenson al multaj entreprenoj kaj loĝantoj pro ilia perdo kaŭzita de katastrofo.

Poste, pro politikaj eraroj en Ĉinio furoris egalismo en distribuado. La laboristoj kaj oficistoj ĝuas senpagan kuracadon kaj laboran bonstatigon. Oni dependas de la ŝtato kaj kolektiva ekonomio ĉe la okazo de nasko, morto, malsaniĝo aŭ kripligo. Kiel ajn malgranda estas la ekonomia profito de entrepreno, ĉi tiu estas subvenciata de la ŝtato kaj tute ne bezonas maltrankviliĝi pri bankroto. Suferantoj de katastrofoj kaj akcidentoj, kompreneble, atendas monhelpon de la ŝtato. Sekve, ne necesas asekuro por individuoj kaj entreprenoj. En 1959 ĉesis la enlanda asekura laboro, kaj tro frue finiĝis la ĵus leviginta asekura afero de Ĉinio.

Pasis pli ol 20 jaroj kaj restis blanko pri asekura afero en la cer-

Konsultiĝa servo de asekura kompanio





bo de la ĉina loĝantaro.

En la tajdo de la reformo kaj pordomalfermo de 1980 la Ĉina Popola Asekura Kompanio restarigis la enlandan asekuran servon. Fine de 1986 20-etaĝa domego kun brunvitra muro kaj la ideogramoj "Ĉina Popola Asekura Kompanio" sur ĝi konstruiĝis en la urbocentro de Pekino. Tiujare la kompanio proponis 210 specojn da asekuraj servoj en- kaj eksterlandaj, prenis sur sin la riskon de monsumo de 1466.7 miliardoj da juanoj kaj la premio atingis 5.25 miliardojn da juanoj.

Kompreneble, la asekura afero de Ĉinio ne povas kompari sin kun tiu de evoluinta lando, kia Usono, Japanio, FR Germanio, Britio aŭ Francio, kies jarpremi-umo superas 20 miliardojn da usonaj dolaroj. Tamen, el la diferenco kaj la leviĝanta ĉina ekonomio, oni povas vidi grandegan latentan forton de la asekura afero de Ĉinio. Oni bone konas la funkcion de la asekura afero el la okazintaĵoj.

Maje de 1987, la furioza incendio invadis 1.01 milionojn da hektaroj da tero de la Granda Xing'an-montaro en la Nord-oriento, forbruligis 850 000 kubmetrojn da ligno kaj ruinigis Mohe, Xilinji kaj Tuqiang. 193 homoj mortis en la incendio, kaj 50 000 homoj fariĝis senhejmu-joj...

La incendio maltrankviligis la tutan popolon. Materialoj por helpi la suferantojn de katastrofo transportiĝis tien de diversaj lokoj de la lando. Tamen, la 120 milionoj da juanoj de asekura kompenso konsistigis eĉ 50% de la totala helpmono. Tio vere mirigis la membrojn de la Hejmorekonstrua Komandejo.

Januare de 1986, iu brita asekura kompanio per miliono da usonaj dolaroj kompensis la instruist-inton, kiu mortis pro akcidento de la usona spaconaveto "Defianto" en tiu jaro. Preskaŭ samtempe, mezaĝulino de Liaoning-provinco, Ĉinio, ricevis de asekura kompanio 5 000 juanojn kiel kompenso pro malfeliĉa morto de sia edzo en

trafika akcidento. Oni ne scias, kion faris per la kompenso la familianoj de la menciita instruistino. Sed la ĉina mezaĝulino per la kompenso aĉetis al siaj bogepatroj po unu kompletan da vestoj kaj al sia infano librosakon, skribilujon... kaj ŝi mem ekhavis la kuraĝon daŭrigi la vivon.

La 6-an de septembro, tiujare, en la registara korto de Guannangubernio, Jiangsu-provinco, okazis kortuŝa sceno: Reprezentantoj el 13 subdistriktoj akceptis per la tremantaj manoj asekuran kompenso de 520 000 juanoj, kiuj estis transdonotaj de ili al 18 530 kamparanaj familioj. Meze de junio, en la rikolta sezono, pro senĉesa pluvado la falĉita tritiko sur draŝejo ne povis sekigi, kio ege maltrankviligis la kamparanojn. Neatendite ili ricevis kompenso. El tio ili bone vidis, ke la asekura kompanio estas garantio de ilia vivo.

La asekuro pri agrikulturo estas neprofito. Laŭ statistiko farita de la asekura sekcio pri agrikulturo de la Ĝenerala Asekura Kompanio, de 1982 ĝis 1989 la asekura sekcio enspezis 487.65 milionojn da juanoj kaj donis kompenso de 572.25 milionoj da juanoj, malprofitante 180 milionojn da juanoj. En multaj landoj la asekuro pri agrikulturo estas rigardata kiel "tabuo". Tamen, la asekura afero de Ĉinio nepre devas tuŝi la "tabuon", ĉar en Ĉinio troviĝas 800 milionoj da loĝantoj en la kampaĵo, la agrikultura produktado okupas gravan lokon en la tuta nacia ekonomio. Cetere, la jam profitintaj kamparanoj rigardas asekuron



Laboranto (dekstre) de asekura kompanio en plagita loko

kiel sian apogilon por disvolvi produktadon. En la ĉirkaŭurbo de Pekino dekmiloj da kamparanaj familioj ricevis diversajn asekurojn. La pli ol 80 000 hektaroj da agroj kaj 700 hektaroj da fruktarboj de la gubernioj Shunyi, Pinggu kaj Huairou estas asekuritaj. Tiaj gubernioj estas malmultaj en Ĉinio.

Se antaŭ kelkaj jaroj la asekura afero estis fremda por ĉinoj, do hodiaŭ ili sentas ĝin nemankigebla en la moderna vivo. Tio estas progreso. Precipe en la reformado de la entreprena administra sistemo iuj entreprenoj, kiuj kutimiĝis al senĝena vivo, ekkonsciis eventualan danĝeron kaj memvole sin turnis al asekura kompanio. Iuj komercaj servoj praktikantaj lukontraktan sistemon, kolektivaj entreprenoj kaj individuaj komercistoj pli aktive sin asekuras. Eĉ temploj kontaktiĝas kun asekura kompanio. Iuj diris, ke la apero de asekura konscio sin bazas sur iaj ekonomia kaj reforma medioj. Tio ne estas senkaŭza. Kun la profundo de la reformo kaj pordomalfermo kaj la disvolviĝo de la komerca ekonomio, la asekura afero de Ĉinio faros grandegan antaŭensalton kaj ne plu estos enigmo por ĉinoj. ■

# Turisma Karavano de “Verda Stelo”

Teksto de WANG SHIRONG  
Fotoj de EPC-raportistoj



Francaj kaj ĉinaj amikoj sur Tian'anmen-placo







Ĉe la Granda Muro



Antikva orumita vazo interesas la gastojn.



Jugoslavaj kaj ĉinaj samideanoj en la Somera Palaco

En la Imperiestra Palaco



En templo sur Taishan-monto



**E**N mia libroŝranko pendas verdstela flago. Ĉe vido de tiu flageto, mi tuj rememoras pri la vojaĝo de la turisma karavano de japanaj kaj koreaj esperantistoj.

En majo ĉijare, la karavano el 12 japanaj kaj 6 koreaj esperantistoj venis al Ĉinio por fari turisman vojaĝon kaj ĉeesti la celebradon de EPC pro ĝia 40-jariĝo. Mi estis speciale delegita al Ŝanhajo por bonvenigi la gastojn de najbaraj landoj.

Pro perturbo aeroplano ne sukcesis ekflugi ĝustatempe de Osaka, kaj la atingo de la karavano malfruiĝis 4 horojn.

"Ili venas!" "Jes, estas ili!" Finfine surteriĝis la aeroplano, kaj ĝoje ekkriis mi kaj komisiitoj de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj la turisma servo. Kun ekscitiĝo mi trovis super la pasaĝera fluo alte tenatan flageton kun verda stelo, kiun sekvis la gastoj de EPC. Tiam jam estis la naŭa nokte. Sendube longa atendado en Osaka kaj la flugado lacigis la gastojn, kaj cetere estis tre malfrue. Ĉu la gastoj povos iri al la planita renkontiĝo kun ŝanhajaj esperantistoj? Kun hezito mi interkonsiliĝis kun la amikoj, kaj ili emociis min per prefero al la renkontiĝo.

Kiam la gastoj atingis la kunvenejon, jam batis la deka. La gastojn aplaŭde bonvenigis Wei Yuanshu, prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kaj aliaj ĉ. 30 esperantistoj. En la nomo de la karavano, sinjoro Nishikawa Toyozo kore dankis la ŝanhajajn samideanojn pro la varma bonvenigo kaj sincere laŭdis la klopodon de EPC por E-movado de la mondo. La konversacio daŭris pli ol unu horon, dume mi devis plurfoje urĝi la gastojn. Kiam ili atingis la hotelon, jam estis la 12-a horo.

En Ŝanhajo la amikoj ŝipveturis sur Huangpu-rivero, vizitis Yuyuan-ĝardenon, la Templon de Jadaj Budhoj kaj Muzeon de Lusin.

Nemalmultaj el la gastoj antaŭe plurfoje vizitis Ĉinion, kaj ĉiufoje ili trovis ion freŝan. Antaŭe Yuyuan estis privata ĝardeno konstruita antaŭ 400 jaroj. La antikvaj konstruaĵoj estis kun majstre gravuritaj kaj brile farbitaj traboj kaj kolonoj kaj regis kvieteco. Tie ni vidis, ke kelke da virinoj estas sin ekzercantaj per glavo. S-ro Nishikawa transprenis de iu el la ekzercantinoj glavon kaj imite faris kelke da movoj. Ĉe tio leviĝis gaja rido, kaj mi fotis lian ne tre gracian, sed seriozan movon.

La Templo de Jadaj Budhoj estas unu el la famaj antikvaj vidindejoj de Ŝanhajo, kiu sidas nordokcidente en la urbo. La templo ricevis la nomon pro la du jadaj budhostatuoj, unu sidanta kaj la alia nirvana. La du budhostatuoj devenis de la budhisma Birmo. La delikate skulptitaj statuoj, kun kvietaj kaj kvaŝaŭ animita mieno, profunde klinis la adorantojn. La gastoj solene kunmetis la manojn kaj pie preĝis por la paco de la homaro kaj por la feliĉo de siaj parencoj.

La dua vizitloko estis la marborda urbo Qingdao. Kiam la amikoj paŝis el la flughaveno, ili estis emociitaj de la sceno: 30

junaj esperantistoj en blanka jako kun verda stelo sin vicigis ĉe la elirejo por bonvenigi la gastojn. Kiam la gastoj atingis la hotelon, ili estis refoje emociitaj de varma aplaŭdado de dekoj da junaj esperantistoj. Supre en la vestiblo pendis ruĝa rubando longa je pli ol 10 metroj, sur kiu estis skribo "Varman bonvenon al vi internacia vizitgrupo de esperantistoj". La gastojn surprizis plue tio, ke "Rimarkigoj por Gastoj" en iliaj ĉambroj estis speciale presitaj en Esperanto. Iu el la gastoj diris kun emocio: "Mi vojaĝis al multaj landoj por UK, sed estas la unua fojo, ke 'Rimarkigoj por Gastoj' estis presitaj en Esperanto."

En Qingdao la gastoj multe interesiĝis pri brakhorloĝo kun marko "Esperanto". La brakhorloĝo produktita de la Qingdao-a Brakhorloĝa Fabriko havas sur sia ciferplato la vorton Esperanto supre kaj verdan stelon malsupre. Multaj el la gastoj aĉetis plurajn klarigante, ke ili donacos tiujn signifajn brakhorloĝojn al siaj amikoj.

La karavano estis forlasonta Qingdao. Samideanoj de Qingdao akompanis la gastojn ĝis la pordo de la vagono. Ilia entuzias-

En la vidindejo Maŭzoleoj Ming-dinastiaj





mo neforgeseble impresis la gastojn. La amikoj diris, ke en 1992 ili certe vizitos refoje Qingdao kaj partoprenos en la Kvina Pacifika Kongreso.

La karavano venis al Qufu de Shandong-provinco. Qufu estas malgranda urbo, hejmloko de la granda ĉina pensulo kaj edukisto Konfuceo (551-479 a.K.). La konfuceanismo fondita de Konfuceo regis Ĉinion pli ol 2 000 jarojn. Nun "Ekskurso en Konfucea Hejmloko" estas karaktera turisma programero en Ĉinio.

La Konfucea Templo, Konfucea Domo kaj Konfucea Arbaro estas tri ĉefaj vidindejoj en Qufu. La templo estis loko por memorigi kaj kulturi Konfuceon. La grandioza konstruaro sterniĝas de la nordo ĝis la sudo unu kilometron. La Konfucea Domo oriente de la templo estis loĝejo por postaj generacioj de Konfuceo. La Konfucea Arbaro, kiu areo 200 hektarojn, estas la tombejo de Konfuceo kaj liaj posteuloj. La tombejo estas ombrata de pli ol 20 000 arboj de mil jaroj. La amikoj fotis aŭ fotiĝis antaŭ la tombejo de Konfuceo. Ili konigis al mi, ke en Japanio estas pluraj temploj por Konfuceo, ke japanoj respektegas Konfuceon kaj lian doktrinon. "Analekto de Konfuceo" estas lernobjekto en multaj lernejoj de Japanio.

Veturinte 81 kilometrojn de Qufu, ni atingis Taishan, unu el la kvin plej famaj pitoreskaj montoj de Ĉinio. Taishan-monto areo 430 kvadratajn kilometrojn kaj ĝia ĉefa pinto altas 1 545 metrojn apikante meze en Shandong-provinco.

Nia aŭtomobilo veturis en la monto. Unuflanke de la aŭtomobilo estis profunda valo kaj aliflanke deklivo, kie ondas verdaj pinaroj base muĝantaj. De tempo al tempo leviĝis antaŭ nia aŭtomobilo rokoj, kiuj kvazaŭ intencis bari al ni la vojon. Sed la aŭtomobilo sprite sin turnis kaj antaŭ ĝi denove etendiĝis senlima montovojo. Neniu volis turni



En la Qingdao-a Fabriko de Konkoskulptitaj Metiartajoj

sian rigardon for de ĉarma pejzaĝo ekster la aŭtomobilo kaj ripozi iomete kun fermitaj okuloj.

La aŭtomobilo atingis la Mezan Ĉielan Pordon ĉe la montotalio. Tie estas la starta ekstremo de telero konstruita kune de Ĉinio kaj Japanio. La telera linio longas 2 078 metrojn. Sendube ĝi estas la plej taŭga veturilo por nefortuloj, kiuj volas sed ne povas grimpi la monton. La Suda Ĉiela Pordo estas la fino de la zigzaga ŝtuparo kaj de tie oni povas atingi la kulminon de Taishan post piedirado de malpli ol 1 000 metroj. Sinjoro Sato Koichiro, 80-jara, tamen sufiĉe brava, pene grimpis kaj fine sukcesis atingi la kulminon. Li diris al mi emocie: "Antaŭ du jaroj mi venis al Taishan, sed ne sukcesis atingi la montosupron. Hodiaŭ mi sukcesis, kaj mi estas feliĉa."

Same kiel s-ro Sato Koichiro, pluraj el la karavano vojaĝis laŭ la sama itinero antaŭ du jaroj. S-ro Sekiya Masazumi, 77-jara, diris al mi, ke li hezitis antaŭ ol vojaĝi al Ĉinio, ĉar li volis vojaĝi ankaŭ al Kubo. Poste li telefonis al s-ro Yosimi Umeda, kaj tiu diris al li: "UK okazas ĉiujare, dum jubileo de EPC pro la 40-jariĝo estos unufoje." Jen li venis al Ĉinio.

Sur la kulmino de Taishan, la

amikoj ĝuis belan panoramon. Nuboflokoj ŝvebis sube, en valoj, kaj la turistoj povis imagi, ke ili estas ĉieluloj. Sude malsupre klare konturigi la urbo Tai'an, kaj inter la multego da altaj domoj ni trovis nian hotelon.

Maja suno brilis super Pekino. Ĉie ĉarmis floroj, ĉie sonoris gajaj ridoj. Pekino estis la lasta vizitloko, kaj Tian'anmen-placo estis la unua vizitata loko en Pekino. La amikoj venis al la placo gvidate de verdstela flago. En maro da homoj, la verdstela flago estis signo de la karavano. "EPC! EPC!" karavanestro s-ro Nishikawa, ĉiam tiele vokis svingetante la verdstelan flagon, kiam li devis kolekti la karavanojn. Lian laŭtan kaj klaran vokon mi aŭdadis dum la tuta vojaĝo de Ŝanhajo ĝis Pekino.

Dum la restado en Pekino, kune kun la gastoj el Francio, Jugoslavio kaj aliaj landoj venintaj gratuli al EPC, la karavano de japanaj kaj koreaj esperantistoj vizitis plurajn vidindejojn.

Antaŭvespere de la hejmeniro, la amikoj kolektiĝis en la vestiblo de la hotelo kaj sincere skribis sian nomon sur la flago, kaj sinjorino Umeda Setsuko metis ĝin en miajn manojn, ke mi memoru ilin. Mi akceptis la karan donacon kaj bone konservis ĝin por ĉiam. Mi neniam forgesos la karavanon sub la verdstela flago. ■

# Fiŝhoka konkurso inter ĉinaj kaj alilandaj eminentuloj

Fotoj de LIU SIGONG


Film-aktoro Zhao Ziyue  
(fronte) en fiŝhokado



Antaŭ nelonge la Vaskularita Hospitalo de la antaŭurbo de Jining, Shandong-provinco, kaj la redakcio de "El Popola Ĉinio" kune okazigis en Pekino la Fiŝhokan Konkurson de Eminentuloj de Pokalo por Konvaleskuloj de Vaskularito, en kiu partoprenis 33 diversrondaj eminentuloj, inkl. s-ron Agejev, komercan konsilanton de la sovetunia ambasadorejo en Ĉinio.

En la sunlumo la konkursantoj fiŝhokis kviete. Vidu, granda fiŝo hokita! Je la momento rideto forpelis streĉan atmosferon de la lagbordo. Post 3.5-hora konkurso 12 partoprenantoj estis premiitaj.


S-ro Agejev hokas fiŝon.





# Mia aparta sento

de LIU ZUNQI\*



La aŭtoro (maldekstre)

**M**I estas honora konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj membro de la socio "Amikoj de Esperanto". Komence de la 30-aj jaroj mi eklernis Esperanton. Poste mi ne persistis kaj ne partoprenis en la sankta afero, kion mi tre bedaŭras hodiaŭ. Tamen mi ĉiam havas apartan senton al Esperanto.

Iam mi lernis en Yanjing-universitato (en la 50-aj jaroj ĝi unuiĝis kun la Pekina Universitato). Julie de 1931, pro partopreno en studenta movado, mi estis arestita. En la malliberejo mi konatiĝis kun mezlernejano Huo Yingren. La komuna idealo kaj sama travivaĵo ebligis al ni interparoli intime. Li estis esperantisto kaj fervore instruis al mi Esperanton. La lernilo estis kompilita de li. Ĉar mi sciis alian fremdan lingvon, mi rapide progresis en lernado de Esperanto. Mi ŝatis tiun lingvon pro tio, ke ĝi estas regula kaj pli facila ol aliaj lingvoj en prononco kaj gramatiko. Poste ankaŭ aliaj junuloj en nia karcero eklernis Esperanton sub ies gardo kontraŭ provoso. Nia vivo fariĝis enhavoriĉa: Ni faris simplan konversacion en Esperanto, rakontis rakontojn kaj mallalte kantis "La Internacion". Poste Huo Yingren estis ĵetita en alian karceron kaj ni disiĝis. Dank' al helpo de progesa organizo mi estis liberigita.

Post la liberiĝo mi daŭre partoprenis en la kontraŭjapana naciŝava laboro kaj forgesis preskaŭ ĉion alian. En Chongqing mi denove renkontis mian bonan instruiston Huo Yingren, kiu, post sia liberiĝo, laboris kiel interpretisto en la ambasadorejo de Sovetunio en Chongqing. Li flue parolis la rusan lingvon. Ni babilis multe. Mi bone memoras, ke li kuraĝigis min persiste lerni Esperanton. Post kelkaj jaroj mi fariĝis ĉefredaktoro kaj vicdirektoro de la Internacia Novaĵ-buroo kaj invitis lin labori kiel estro de la ruslingva sekcio. En tiuj jaroj ni ofte menciis Esperanton, sed mi ne lernis ĝin pro okupiteco.

Kvankam mi lernis Esperanton en mallonga tempo, tamen mi multe progresis kaj ĝi profunde impresis min. Mi aparte amas ĝin kaj ofte legas Esperantaj revuojn, inkl. EPC. Mi pensas, ke se oni ellernas Esperanton, oni povas facile lerni aliajn lingvojn. La literoj, gramatiko kaj vortorigino de Esperanto estas similaj al tiuj de multaj hind-eŭropaj lingvoj. Kaj krome, Esperanto havas multe da internaciaj vort-radikoj kaj prefiksoj, tial oni povas ellerni ĝin en mallonga tempo.

Antaŭe mi kaj miaj samtempuloj lernis Esperan-

ton fanatike, opiniante, ke Esperanto povas anstataŭi ĉiujn naciajn lingvojn, sed nun malaperis tia fanatikeco. Fakte Esperanto povas anstataŭi neniun lingvon, sed kiel helpa lingvo por internacia komunikado ĝi ludas apartan rolon. Se oni posedas Esperanton, oni havas plian komunikilon, plian okulparon. Mi scias, ke s-ro Hujucz vojaĝis en multaj landoj ĝuste kun helpo de Esperanto. Ĉie, kie li estis, esperantistoj bone helpis lin. Kaj li fine atingis Sovetunion. Ĉar li posedis unuamanan materialon, li skribis multe da bonaj korespondaĵoj. Nun ankoraŭ necesas vastigi la sferon de lernado de Esperanto. Se multigos personoj, kiuj scias Esperanton, ĝi estos certe uzebla. En 1953 mi vizitis Pragon kaj vidis, ke tieaj soforoj parolas 4-5 lingvojn, inkl. Esperanton. Tio faciligis kaj akcelis interkomprenon. Tial mi konsilas al junuloj de nia lando, ke ili lernu unue Esperanton kaj poste aliajn lingvojn.

Mi emas partopreni aktivadojn okazigitajn de Esperantaj organizoj kaj volas amikiĝi kun esperantistoj. En 1981 s-ro Zhang Qicheng informis min pri la fondo de la Pekina Esperanto-Asocio. Ni konatiĝis antaŭlonge en Chongqing. Tiam li laboris en la redakcio de "Xinhua Ribao". Inter la esperantistaj amikoj, kiujn mi konas, estas Chu Tunan, Ge Baoquan, Ĵelezo, Chen Yuan kaj Venlo Fon.

Dum longa tempo mi laboris en la gazetara kampoj kaj sciis iom pri suferoj de Esperanto. Iam iuj registaroj deklaris neleĝaj lernadon kaj uzadon de Esperanto; ankaŭ naciistoj oponis kontraŭ Esperanto. Fakte Esperanto mem portas la internaciisman karakteron, tial siatempe multaj junaj revoluciuloj amis Esperanton kaj prenis ĝin kiel simbolon de progreso. Kiam ili renkontiĝis, ili intime nomis unu alian "kamarado"; kiam ili interparolis ĉine, ili ofte intermetis iom da Esperantaj vortoj, tiel ke aliuloj ne komprenis la sencon. Esperanto fariĝis sekreta lingvo de revoluciuloj. Tiam ĝin lernis ankaŭ progresemoj kaj laborantoj pri latinigo de la ĉinaj ideografiaĵoj.

Videble, Esperanto havas sian gloran tradicion en Ĉinio. Ni portas respondecon por daŭrigi tiun tradicion. Nun la angla lingvo estas uzata preskaŭ ĉie en la mondo, kio estas kaŭzita de historio. Sed Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj ludas unikan rolon en la internacia komunikado. Ĝia perspektivo estas brila. ■

\* La aŭtoro estas vicprezidanto de la Ĉina Ĵurnalistista Asocio.

# Glora Ĉinio

de AFONSO CELSO DE OLIVEIRA kaj  
CANTILIA DE BARROS OLIVEIRA (Brazilo)

**H**O, mistera kaj mirinda Ĉinio!...

Kiam ankoraŭ infanetoj, en infanaj rondetoj, ni aŭdis rakontojn pri misteraj drakoj, princoj kaj princinoj, feoj kaj feinoj, sorĉistoj kaj sorĉistinoj... Sed iom pli grandetaj, jam balbutantaj legantoj, ni legis revajn, ravajn fabelojn pri orientaj landoj, pri kalifoj kaj karavanoj sur varmaj dezertoj kaj freŝaj oazoj.

Kaj ĉiam la bono venkis la malbonon; la bona afero ĉiam estas la venkisto. Kaj heroo gajnas principon; aŭ mizera junulino vere estas principino kaj bufo vere estas princo, kiu denove estas princo, kaj ambaŭ eniras majestan kastelon... Granda festo... Edzeco... — Do, ankaŭ orienta Ĉinio estis por ni lando, en kiu

knaboj kaj knabinoj, junuloj kaj junulinoj povus esti ne nur homoj, sed ankaŭ bestetoj aŭ blankaj cignoj flugantaj en la blua ĉielo, aŭ sur mistera kaj plaĉa lageto.

Ni kreskis... Ni estis gejunuloj... Ni geedziĝis... Kaj mem ekstere malriĉaj, interne ni estis tre riĉaj: la infanaj revoj ne lasis nin. Kaj pro tio ni estis ĉiam feliĉaj!... Sed nia vivo estis, ekde infanoj, "feroca batalo". Kaj... duope, por du batalantoj, ĉiam estas pli facila iomete da venko, ĉu ne?

Post jaroj kaj jaroj ni ne estas nur du, ni estas kvin batalantoj: du filinoj kaj unu filo. Ĉu la vivo ne estas por ĉiuj homoj senlima batalo? Niaj gefiloj kreskis, edziĝis kaj estas apartaj batalantoj!...



La aŭtoroj

En maljuneco, iun tagon ni "malkovris" Esperanton. Pere de Esperanto ni malkovris "El Popola Ĉinio". Kaj... per "El Popola Ĉinio" ni malkovris la hodiaŭan Ĉinion.

Sed... komparante Ĉinion en la revoj de nia infaneco kun la nuna Ĉinio, ni diras: "Benata Dio! — Benu nian misteran kaj mirindan laborbatalantan Ĉinion. Por ni, ambaŭ Ĉinioj: la de nia infaneco kaj la nuna... estas nur unu glora Ĉinio!" ■

# Dankon al Ĉinio

de ALCEBIADES GERALDO LOPES (Brazilo)

*Ĉe Vi bele floras Esperanto,  
Inundante mondon je fratamo.  
Nin ĝojigas via ĉarma kanto,  
Ilo melodia de homamo.  
Orde, pace, antaŭen, Ĉinio!*

Mi Vin kore salutas!

Dankemo estas virto malbone zorgita de la homoj kaj mi apartenas al la grupo ne laŭdinda tiurilate.

Mi petas pardonon pro tio, ke mi ĝis hodiaŭ ne dankis Vin pro la bonega laboro favore al Esperanto.

Jam de pluraj jaroj mi estas abonanto de la plej bona Esperanta revuo en la mondo, ne hazarde eldonita de gefiloj Viaj: "El Popola Ĉinio".

Mi eĉ ne respondis la enketilojn senditajn al mi kune kun ekzempleroj de "El Popola Ĉinio". Tio okazis, ĉar mi ne gardas la ekzemplerojn ricevatajn, kiujn mi uzas por propagandi Esperanton (kaj diskonigi Ĉinion), transdonante ilin al gelernantoj de Esperanto ĉe Niterói (Niteroj) Esperanto-Klubo, kiu funkcias

en la proksima urbo Niterói kaj estas de mi nuntempe gvidata.

Ĉu la Homaro jam dankis Vin pro la bazo por la grandskala skriba komunikado — la papero?

Ĉu la Homaro jam dankis al Vi pro la bazo por la vojaĝo al la Luno, kiu malfermis la pordon al la Kosmo — la raketo?

Ĉu la Homaro jam komprenis, ke Vi meritas laŭdojn por ricevi en via sino tiom da gefratoj niaj, kiuj bezonegis naskiĝi por akiri plej bonajn konojn pri la materia vivo? La danko venos post la kompreno.

Ĉu la Homaro jam taksis kiom valoras viaj klopodoj por ke ĝi povu — uzante Esperanton — detru Babelon kaj starigi surtere Mondon de Paco, sub la regado



## ESP-NOVAĴOJ

● En la 22-a de junio *Renmin Ribao*, la plej influa ĵurnalo en Ĉinio, raportis, ke en Pekino antaŭ nelonge fondiĝis la Esperanta Instituto pri Sciencoj kaj Tekniko. Tiu instituto estas fondita kune de la Ĉina Scienc-teknika Administra Universitato kaj la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. En ĝi oni funkciigos fakojn de biotekniko, ekologia



La kovrilpaĝo de "Profilo de Zhou Enlai" kaj bildoj por la libro

medio, akupunkturo kaj masaĝo, kaj internacia ekonomia komerco. Ĝi akceptos la unuajn studentojn en septembro, ĉi-jare.

● *Profilo de Zhou Enlai*, verkita de Percy Jucheng Fang kaj Lucy Guinong J. Fang, estas eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en Esperanto. Ĝia originalo estas anglalingva eldonita de la Fremdlingva Eldonejo de Pekino. Tiu libro detale kaj vivece prezentas la brilan vivon de Zhou Enlai, eksĉefministro de Ĉinio. Ĝi, kun 68 fotoj, havas 253 paĝojn.

● Feng Gong, fama juna aktoro, diris "saluton" en pli ol 50 naciaj lingvoj en humura dialo-

go kun titolo *Vojaĝo tra la mondo*, inkl. de Esperanto. Li esperis, ke li prezentos humurajn dialogojn en Esperanto. Li diris: "Esperanto estas lingvo kompare scienca. Se ĉiuj homoj parolus Esperante, sur la tuta terglobo regus amo."

● Lastatempe estis eltrovita uzita koverto kun Esperanta poŝtstampo de "Celebre al la 10-jariĝo de la Liberigo de Changshu", kiu estis sendita de Changshu-gubernio de Jiangsu-provinco al alia loko antaŭ 31 jaroj. La trovo de la Esperanta memora poŝtstampo havas gravan signifon en la historio de la ĉina Esperanto-movado. Ĝi estas unua Esperanta poŝtstampo de Ĉinio nun trovita. Ĝia projektinto estas veterana esperantisto Zhang Linrui.

● La televida filmo *Verda Stelo — Ligilo de Amikeco*, farita de la Pekina Televido, estis telesendita en la Programo *Grandvida Ĝardeno* de la televido la 11-an de julio. En la sekvanta tagmezo ĝi estis denove telesendita. La filmo daŭras 18 minutojn. Ĝi detale prezentas la statojn de El Popola Ĉinio post la fondiĝo kaj ĝiajn grandiozajn festaĵojn de la 40-jara jubileo. La filmo estas dublita en Esperanto.

● La Limigita Kompanio de la Eldonejo Donghua, Taiwan eldonis *Elektitaj Tradukaĵoj de Bakin*, kiu enhavas 10 verkojn, inter kiuj estas *Printempo en la Aŭtuno* verkita de Julio Baghy en Esperanto kaj ĉinigitaj de Bakin.

● Jugoslaviaj fervojistoj-esperantistoj festis antaŭ nelonge duoblan jubileon: 65 jaroj

de organizita Esperanto-movado inter jugoslaviaj fervojistoj kaj 35 jaroj de JAFE. La jubilea manifestacio okazis en la urbo Vranje (Suda Serbio) sabaton, la 21-an de aprilo 1990 en ĉeesto de pli ol 200 membroj el 14 fervojistaj Esperanto-societoj kaj aliaj gastoj el la tuta lando. Kaj estis eldonita ankaŭ speciala poŝtkarto kaj en la poŝtofiĉejo la tutan tagon funkciis speciala stampilo.

● De la 27-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 1990 denove okazis grava seminario en la gastodomo de Kulturligo en Bad Saarow.

Kolektiĝis 37 fakuloj al la akademia sfero por trakti per 24 prelegoj la temon "Esperanto-objekto de akademia esplorado kaj instruado". La partoprenintoj venis el Bulgario, GDR, FRG, Japanio, Hungario, •Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio. Aparte interesa estis la prezento de la rumana akademia modelo, krei Esperantomovadon en nacia skalo, prezentita de prof. F. Bociort, prezidanto de la nove fondita Rumana Esperanto-Asocio.

● Inter la 11-a kaj la 13-a de majo 1990 okazis la 35-a Kultura Semajnfino de la Saarlanda Esperanto-Ligo in D-6650 Homburg-Saar. Laŭtradicie funkciis kvar kursoj porkomentaj, du porprogresintaj kaj seminario kun sinjoro Eddy Borsboom pri la vivo kaj verkaro de L. L. Zamenhof. Partoprenis ĉi-foje 67 personoj, ĉefe el Francio, Nederlando, Luksemburgo kaj Germanio.

La venonta 36-a Kultura Semajnfino okazos en decembro en D-6650 Homburg, Kardinal-Wendel-Hars.

de Fratamo? Atendu pacience la dankon, ĉar ĝi certe venos.

Viaj kontribuoj al la homara progreso estas ne eble menciitaj en malmulte da vortoj. Pro ili ĉiuj mi kore dankas.

Ŝajnas al mi, ke la publikigado, post tradukado en la ĉinan

lingvon, de ĉi tiu letereto, en ĵurnalo ne-esperantista, povos kontribui, kvankam modeste, por la disvastigado de nia komuna idealo.

Bonvolu permesi, ke mi sugestu ion pli: publikigu, en "El Popola Ĉinio", regule kaj ĉinlingve

(kompreneble kun traduko Esperanta), paĝon petantan geĉi-  
nojn loĝantajn ekster Ĉinio, ke ili lernu Esperanton kaj serĉu Esperanto-grupon, kie ili povos ĝui la fratecan etoson de nia Monda Familio.

Antaŭen, Ĉinio! ■

# Pentrado saĝigas la infanojn

## — Pri esploro far belarta instruistino Du Mei

**L**A 55-jara s-ino Du Mei laboris kiel instruistino jam 37 jarojn. 800 hom-fojoj el ŝiaj 5 000 lernantoj estis premiitaj en ĉinaj kaj internaciaj ekspozicioj de infanaj pentraĵoj.


Instruistino Du laboras en la Dua Progresiga Lernejo de Chaoyang-distrikto, Pekino. Tie ŝi kulturas belartajn instruistojn de elementaj lernejoj kaj samtempe respondecas pri esploro de belarta instruado de la elementaj lernejoj de la distrikto. Donante grandan atenton al gvido de la junaj instruistoj, ŝi helpas ilin en posedo de diversspecaj instruaj metodoj. En la lastaj jaroj ŝi dekkelkfoje organizis ekspozicion de infanaj pentraĵoj.

Post longtempa observado, ŝi konstatis, ke la sukcesoj de ŝiaj lernantoj en la laboro ne disiĝas de ilia pentrado en la infaneco. Laŭ ŝia opinio, la esploro pri infana pentrado celas ne nur instrui la infanojn en la pentrado, sed ankaŭ studi specialan funkcion de la pentrado en la intelekta evoluo de la infanoj, precipe en ilia figura pensado.

Komence ŝi konis nur fragmentajn materialojn, sed ne esploris la psikon de la infanoj dum ilia pentrado, nek sciis, kiel ili esprimas siajn konon, senton kaj imagon ĉe la pentrado.

Intertempe ŝi legis multajn librojn, koncernajn materialojn ĉinajn kaj alilandajn. Finfine, ŝi trovis, ke tiuj verkoj kvankam estas utilaj, tamen neperfek-

Du Mei gvidas infanojn en pentrado.



taj. La “Teorio de Denaska Genio”, “Teorio de Medio” kaj aliaj ambiguaj vidpunktoj, kiujn ŝi ofte aŭdis en la lekcio, ne povis konvinki ŝin. Ĉio ĉi tio urĝis, ke ŝi faru spurajn enketojn de infanoj sub malsamaj vivkondiĉoj.

Sekve dum 10 jaroj ekde 1978 ŝi oferis ĉiujn siajn postlaborajn horojn al 20 infanoj kun malsamaj aĝoj kaj karakteroj el malsamaj familioj.


Laŭ ŝiaj propraj spertoj kaj raciaj metodoj de aliaj landoj, ŝi instruis tiujn 20 infanojn per malsamaj metodoj. Ŝi turnis apartan atenton al la 2-3-jaraj infanoj pri ilia laŭvoleco kaj lerteco kaj al la 4-5-jaraj infanoj pri ilia kreiveco. Antaŭ la pentrado, ŝi rakontis rakontojn al ili aŭ faris amuzan ludon. koncerne la pli-ol-7-jarajn infanojn, ŝi ne nur iniciis ilin pri la originala kreado, sed ankaŭ konigis al ili diversajn esprimmanierojn kaj simplajn belartajn sciojn.

S-ino Du neniam permesis al la infanoj paŭzi la preparitan pentraĵon nek devigis ilin fari tion kaj alion. Ŝi alte taksas stimuladon de la aktiveco de la infanoj por altigi iliajn observojn kaj komprenajn povojn. Pri tio ŝi diris:

“Ĉiu havas sian propran vidpunkton en la observado kaj konado de la socio. Ĉiu havas bone konatajn aferojn. La infanpentraĵo devas havi sian karakteron. La misio de belarta instruistino estas riĉigi la imagpovon de la infanoj kaj pli-liberigi ilian kreadon, sed ne kateni ilin. Nur tiamaniere, la infanoj, plenkreskinte, havos riĉajn imagpovojn kaj kreivecon.”

Wang Ting eklernis pentradon en la aĝo de 4 jaroj. Inicite de instruistino Du, li montris riĉajn imagpovojn kaj kreivecon en la pentrado post nur unu jaro. Li ŝatas ne nur pentri ĉarojn, sed ankaŭ projekti diversajn veturilojn. Iufoje, liaj gepatroj vojaĝis aliloken kune kun li. La vojaĝo estis maloportuna en la trafiko, loĝo, manĝado k.a. Reveninte hejmen, Wang Ting pentris pentraĵon kun titolo “Mia Familia Aŭto”. En la aŭto troviĝas dormejo, kuirejo, tenejo kaj tualetejo. Ĝi, ekipita per levilo kaj du helicoj, povas facile iri, eĉ renkontante riverojn





Pentraĵoj de infanoj

kaj aliajn baraĵojn. En 1989, kiam li vidis en TV, ke la tute simplaj kaj krudaj, uzataj de la scienc-ekspedicio sur Yangzi-rivevo, plurfoje endangeriĝis, li faris pentraĵon, nome "Ekspedicia Boato" en formo de blanknaĝila delfeno, regata de komputoro, kiu povas iri facile kaj sekure kaj sur akvo kaj sur tero. Ĝi, kapabla protekti la veturantojn kontraŭ atako de sovaĝaj bestoj, navigacias en akvo tage, kaj nokte paŭzas ĉe la bordo.

La 11-jara knabo Ji Zhi estis petola en la aĝo de 4 jaroj. Ofte li ludis pilkon en la domo kaj multe ĝenis sian najbarinon, instruistino Du, kiu estis malsana siatempe. Tiam s-ino Du ekinstruis lin pentri aprobite de liaj gepatroj.

Post 6 monatoj, li partoprenis por la unua fojo la ekspozicion de infanaj pentraĵoj ĉinaj kaj usonaj. Tio multe interesis lin pri la pentrado. Hejme li pentris siajn gepatrojn kaj fraton. Ekstere li pentris ĉion, kio plaĉis al li. Ĉar li ŝatas skizon, instruistino Du do proponis al liaj gepatroj kune kun li viziti diversajn muzeojn kaj ekspoziciojn. Instruistino Du ofte petis lin rakonti la enhavon de siaj pentraĵoj kaj rimarkigis al li la mankojn de liaj pentraĵoj.

Por bone pentri oni devas esti observema, legi referencajn materialojn kaj ofte mem pripensi. La pentrado faris la infanojn spritaj en la imago, kompare multsciaj, memrespektaj kaj memfidaj. Ji Zhi ja estis elstara en lernado de la ĉina lingvo, matematiko, kaligrafado kaj aliaj studobjektoj. Li gajnis la 5-an lokon en la Ŝako-konkurso de Pekino kaj la duan lokon en la ĉinlingva konkurso inter pekinaj element-lernejanoj.

Instruante pentradon, s-ino Du neniam forgesis severe postuli la infanojn en ilia konduto kaj moralo. Ŝi opinias, ke, ĝenerale dirite, la gepatroj donas atenton al la manĝado kaj vestado de siaj infanoj, sed neglektas iliajn moralajn kvalitojn kiaj la akurateco, fideleco, kuraĝeco kaj persisteco, kiuj ja estas decidaj faktoroj por la homa vivo. Ŝi deziras, ke iliaj gepatroj atentu edukon al siaj infanoj ĉiflanke.

10 jaroj pasis. Tiuj infanoj fariĝis 17-18-jaraj gejunuloj kaj preskaŭ ĉiuj havis sian lokon en ĉinaj kaj internaciaj belartaj ekspozicioj.

Surbaze de sia praktikado, instruistino Du verkis la librojn "Gvido de Pretrado por Infanoj" kaj "Intelekta Ekspluato en Infana Pentrado k.a.", per tio ŝi faris plian kontribuon al esploro de la infana pentrado.

La eksperimentado de s-ino Du ankoraŭ ne finiĝis. Nun ŝi utiligas en iu kurso la spertojn gajnitajn de ŝi en helpo al apartaj lernantoj por informiĝi, ĉu ekzistas ebleco disvastigi ilin. Ŝi pensas ne pri kelkdek lernantoj, sed pli kaj pli multaj infanoj. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34


### Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

### Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



La altkapacita transporta raketo Changzheng 2 antaŭ lanĉo

● La unuaperioda konstruaĵo de granda astronautika lanĉilo finkonstruiĝis kaj ekfunkciis antaŭ nelonge en la Satelit-lanĉa Centro de Xichang, Sichuan-provinco, Ĉinio. Ĝi servos al la ekspluato de internacia astronautiko.

La ĉefa parto de la instalaĵo konsistas el turo, libere movebla en suda-norda direkto, alta je 97 m kaj peza je pli ol 4 000 tunoj, kaj fiksa turo por lanĉo, alta je 74 m kaj peza je 1 050 tunoj. Tie oni faras antaŭlanĉan sintezan ekzamenon de transporta raketo kaj artefarita satelito kaj aliajn servojn.

● En la pasinta jaro 831 entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj en Ĉinio ĉiu profitis pli ol milionon da usonaj dolaroj. Inter ili 49 profitis ĉiu pli ol 10 milionojn da usonaj dolaroj kaj 78 havis ĉiu profiton de 5-10 milionoj da usonaj dolaroj.

● La eduka afero de la Tibeta Aŭtonoma Regiono multe progresis en la pasintaj 40 jaroj post la paca liberiĝo en 1951. Nun en la regiono funkcias sume 2 538 diversaj lernejoj kun 170 000 ler-

nantoj. La nacimalplimultaj lernantoj konsistigas 88.6%, kaj plejparto de la instruistoj estas nacimalplimultanoj.

● Iu esplora grupo de la Kemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, sub la gvido de juna sciencisto Bai Chunli, post du-jara penado, unuafoje akiris bildon de atomdistingo per memprojektita atommikroskopo kaj vidis la strukturojn de surfacaj atomo kaj molekulo de organika magneto kaj tiujn de surfacaj molekuloj de amina acido de insulino.

Nun nur laboratorioj kaj universitatoj de malmultaj landoj, kiaj Usono, Svisio kaj FR Germanio, havas tiajn aparatojn, el kiuj nemalmultaj povas atingi atomdistingon kaj nun ankoraŭ ne vendiĝas tiaj aparatoj.

● Ĉinio produktas elektron, uzante rizseĵojn kiel hejtajon kaj praktikas teknikon de paralela konekto de du generatoroj, kio estas avangarda en la mondo.

● De 1978 ĝis nun Ĉinio sendis al aliaj landoj sume pli ol 60 000 studentojn je ŝtata pago kaj 20 000 je privata pago por lerni tie. Ĝis la lasta jaro 33 000 studentoj, finintan lernadon, revenis al la patrio. La ŝtato daŭre sendos elstarajn personojn al aliaj landoj por la sama celo.

● La kurioza fenomeno "siesto" de plantoj, pri kiu disputis duonjarcenton internacie plantologoj kaj biologoj, estis pruvita lastatempe de ĉinaj sciencistoj. "Siesto" de plantoj kaŭziĝas ĉefe de la fermado kaj malfermado de stomoj sur la folioj. Multaj eksperimentoj pruvis, ke forigo aŭ mildigo de la "siesto" ebligas rimarkinde altigi produktokvanton.

● De la 24-a de junio ĝis la fino de la kuranta jaro, la Unua Televido de FR Germanio telesendas ĉinan serian televidfilmon el 26 partoj, adaptaĵon de la ĉina klasika romano «Songo en Ruĝa Buduaro».

● La nomo de Gou Yanling,




Tibetana instruistino (la dua de maldekstre) kaj studentoj

telefonistino de la Poŝta kaj Telekomunika Buroo de Harbin, Ĉinio, estis enlistigita en la libron «Rekordoj de Guinness» de 1989. En prezentado de fakaj ekzercoj far ĉinaj telefonistoj, ŝi parkere legis 15 000 telefonnumerojn de Pekino, Tianjin, Ŝanhajo, Kantono k.a., kaj per tio gajnis la ĉampionecon.

● 8-jara Li Zhen estas la plej juna ĉino, kiu plurfoje akiris ŝtatajn patentojn. En 1989 ŝi inventis "plenprotektajn buŝtukojn kaj tablotukojn", kiuj estas bonvenaj en hoteloj kaj restoracioj de Tajlando, Kanado k.a. Ĉi-jare ŝi akiris aliajn ŝtatajn patentojn por siaj inventaĵoj sepkolora juvelŝtona lanterno kaj pluruza skribilujo.

● La Pekina Internacia Amikeca Forsto kun areo de 66.7 hektaroj jam havas rudimentan skalon. Statistiko de koncerna departemento montras, ke post ĝia

Hong Zhiliang (meze), vicprofesoro de Fudan-universitato de Ŝanhajo, kiu gajnis doktorecon en Svisio, kaj aliaj instruistoj en scienca esplorado





starigo en 1984 ĉ. 8 000 personoj el 105 landoj kaj regionoj tie plantis arbojn. Administrantoj numeris ĉiujn arbojn kaj indikis la datojn kaj lokojn de plantado por memoro pri amikeco al la plantintoj.

- Lastatempe oni trovis ĉ. dek-mil antikvajn rokbildojn en montoj ĉe la guberniurbo Mori de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La plej granda el la bildoj altas 4 m, longas 30 m, kaj la plej malgranda longas kaj altas nur 25 cm respektive. La bildoj prezentas ĉasadon, paŝtadon, luktadon, dancadon kaj generadon de nomadoj. Ili plejparte estas gravuritaj, kaj la aliaj farbitaj, tre vivecaj.

- La plano de la ĝardeno Yuanmingyuan, perdita antaŭ longe, estis trovita inter la libroj konservataj en la Imperiestra Palaco. Fakuloj opinias, ke la plano prezentas la panoramon de Yuan-

mingyuan antaŭ ĝia forbrulo kaj estas plenplano, kiu prezentas la panoraman vidon de Yuanmingyuan, inkluzive de la ĝardenoj Yuanmingyuan, Qichunyuan kaj Changchunyuan. Yuanmingyuan estas imperiestra ĝardeno, konstruita en Qing-dinastio (1644-1911) en la okcidenta antaŭurbo de Pekino, kaj laŭdata kiel "la plej impona ĝardeno inter la ĉinaj ĝardenoj". Ĝia konstruado daŭris 150 jarojn. En 1860 ĝi estis forbruligita de la alianca armeo de Britio kaj Francio, nun restas nur ĝia ruino.

- La ĉina narkotaĵ-malpermesa laboro atingis rimarkindan sukceson. Nur en 1989 Ĉinio traktis 547 narkotaĵ-vendajn kazojn, arestis 749 narkotaĵ-vendistojn en- kaj eksterlandajn, konfiskis 269 kg da opio kaj 488 kg da heroino.

- La 13-an de julio la Pekina

Turisma Servo publikigis ĉambroluprezojn de 36 hoteloj de Pekino por alilandaj gastoj en la turisma sezono de 1990. Nun la luprezo por unu ĉambro de la plej luksa hotelo Wangfu en Pekino estas 180 usonaj dolaroj, kaj tiu de la tristela Yulong-hotelo — 45 usonaj dolaroj. Estas la unua fojo en la turisma historio de Pekino, ke oni publikigis ĉambroluprezon, kun la celo pli bone servi al turistoj.

- La altkapacita transporta raketo Changzheng 2, farita de Ĉinio, estis sukcese lanĉita la 16-an de julio. La unua kaj dua ŝtupoj kaj pelatoroj de la transporta raketo normale funkciis kaj portis simulan sateliton en orbiton.

La raketo, kiu portis ankaŭ malgrandan eksperimentan sateliton por Pakistano, estis lanĉita de Ĉinio per nova granda astronautika lanĉilo. Tio markis, ke Ĉinio kapablas lanĉi pezan sateliton.

## AMUZOJ

# Ĉina ŝako (X)

de RONG HUI

## FINA STADIO (3)

### Fina stadio kun kanono





Atako kun kanono kiel ĉefa ataka ŝakpeco nomiĝas fina stadio kun kanono.

En la bildo 1 la ruĝa partio havas kanonon, kompletajn gvardianojn kaj elefantojn kontraŭ la ĉaro kaj soldato de la nigra partio kaj povas sin defendi kaj atingi paciĝon. La ruĝa partio povas movi liberajn ŝakpecojn. Nur se ĝiaj gvardianoj kaj elefantoj estos ne kaptitaj de la nigra soldato, la nigra partio venkos malfacile. Eĉ se la nigra partio kaptos la ruĝajn gvardianojn aŭ elefantojn oferante sian soldaton, la rezulto estos ankoraŭ paciĝa. Bonvolu provi la ŝakludon.

En la bildo 2 la ruĝa partio faras atakon per kanono kaj soldato kontraŭ la nigra partio kaj estas

malfacile por ĝi gajni la venkon, pro tio ke la nigra partio havas kompletajn gvardianojn. Sed la ruĝa partio movas sian kanonon al la centra linio kaj devigas la nigran ĉefgeneralon forlasi la centran linion, tiam la ruĝa partio ofertas sian kanonon por kapti la du nigrajn gvardianojn kaj per tio pavimos la vojon por sia venko. La konkretaj movoj estas jenaj: La ruĝa kanono moviĝas de la 3-a linio al la 5-a, la nigra gvardiano retiriĝas de la 5-a linio al la 6-a; la ruĝa ĉefgeneralulo sur la 4-a retiriĝas unu paŝon, la nigra ĉefgeneralulo moviĝas de la 5-a al la 4-a; la ruĝa ĉefgeneralulo moviĝas de la 4-a al la 5-a, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 4-a al la 5-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 5-a al la 8-a, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 5-a al la 6-a; la ruĝa kanono sur la 8-a retiriĝas tri paŝojn, la nigra gvardiano retiriĝas de la 6-a al la 5-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 8-a al la 2-a, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 5-a al la 6-a; la ruĝa kanono sur la 2-a moviĝas antaŭen du paŝojn, la nigra gvardiano sur la 6-a retiriĝas al la 5-a aŭ moviĝas antaŭen al la 5-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 2-a al la 5-a kaj sukcesas kapti la nigran gvardianon. La ruĝa partio oferis unu kanonon por kapti la du nigrajn gvardianojn, neniel povas sin movi la nigra ĉefgeneralulo kaj estis venkita.

En la bildo 3 la ruĝa partio kun kanono kaj soldato batalas kontraŭ la nigra partio kun unu



elefanto kaj venkos per soldato maldekstre kaj ĉefgeneralo dekstre, barante la vojon de la nigra elefanto per sia kanono. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa soldato moviĝas de la 5-a al la 6-a, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa kanono sur la 8-a moviĝas antaŭen kvar paŝojn, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa ĉefgeneralo sur la 4-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a retiriĝas unu paŝon; la ruĝa soldato sur la 6-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a retiriĝas plian paŝon; la ruĝa kanono moviĝas de la 8-a al la 6-a, la nigra elefanto retiriĝas de la 3-a al la 1-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 6-a al la 8-a, la nigra elefanto retiriĝas de la 1-a al la 3-a; la ruĝa kanono sur la 8-a moviĝas antaŭen du paŝojn, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa ĉefgeneralo sur la 4-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a retiriĝas unu paŝon; la ruĝa soldato sur la 6-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉefgeneralo troviĝas en senlirejo kaj estas morte ŝakigita.

En la bildo 4 la nigra partio posedas kompletajn gvardianojn kaj elefantojn, la ruĝa partio havas nur kanonon kaj soldaton, tial ĝenerale la venko estas malfacile akirebla por la ruĝa partio. Sed la ruĝa partio venkos artifice manovrante siajn kanonon kaj soldaton. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa soldato sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon kaj kaptas la nigran elefanton, la nigra elefanto moviĝas de la 7-a al la 5-a kaj kaptas la ruĝan soldaton; la ruĝa kanono moviĝas de la 2-a al la 5-a, neniu el la nigraj ŝakpecoj povas moviĝi kaj la nigra partio estas venkita. Aŭ la ruĝa soldato sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon kaj kaptas la nigran elefanton, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 5-a al la 4-a; la ruĝa kanono sur la 2-a moviĝas antaŭen sep paŝojn, la nigra gvardiano retiriĝas de la 4-a al la 5-a; la ruĝa ĉefgeneralo sur la 6-a retiriĝas unu paŝon, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 5-a al la 6-a; la ruĝa soldato moviĝas de la 5-a al la 4-a kaj kaptas la nigran gvardianon, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa kanono sur la 2-a retiriĝas unu paŝon, la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a retiriĝas unu paŝon; la ruĝa soldato sur la 4-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 6-a al la 5-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 2-a al la 5-a kaj kaptas la nigran gvardianon, la nigra elefanto moviĝas antaŭen de la 7-a al la 9-a; la ruĝa kanono sur la 5-a

retiriĝas du paŝojn, la nigra elefanto moviĝas antaŭen de la 9-a al la 7-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 5-a al la 4-a, la nigra elefanto retiriĝas de la 7-a al la 9-a; la ruĝa kanono moviĝas de la 4-a al la 2-a, la nigra elefanto retiriĝas de la 9-a al la 7-a; la ruĝa kanono sur la 2-a moviĝas antaŭen du paŝojn por ŝtopi la vojon de la nigra elefanto, la nigraj ĉefgeneralo kaj elefanto neniel povas sin movi kaj estas venkita. ■

## La solvo de "Malfacile Solvebla Enigma" por la naŭa numero

La bremsisto loĝas en loko troviĝanta survoje de Hongkongo al Singapuro kaj estas najbaro de la sinjoro, kies enspezo estas trioblo de lia enspezo. Tiu sinjoro ne estas sinjoro Luo, ĉar li loĝas en Singapuro; ankaŭ ne sinjoro Jiang, ĉar li ĉiujare enspezas dudek mil usonajn dolarojn, tiu sumo ne povas esti dividita per tri sen resto. Tial la najbaro de la bremsisto certe estas sinjoro Shi.

La komercisto, kies familia nomo estas sama kiel tiu de la bremsisto, loĝas en Hongkongo. Li ne estas sinjoro Luo, ĉar Luo loĝas en Singapuro; ankaŭ ne sinjoro Shi, ĉar Shi estas najbaro de la bremsisto, kiu loĝas en loko troviĝanta survoje de Hongkongo al Singapuro. Tial li certe estas sinjoro Jiang.

Samkiel tiu sinjoro, ankaŭ la bremsisto havas familian nomon Jiang.

En la bilarda ludo Shi venkis la hejtiston, sekve tiu ĉi certe havas familian nomon Luo.

Tial la lokomotivestro certe havas familian nomon Shi.

## Ovoŝelo kun pentrita vizaĝo

En metiartajaj butikoj de Ĉinio videblas tre ŝatindaj ovoŝeloj kun pentritaj vizaĝoj de pekinopero, la ovoŝeloj estas malplenaj, sed sur ili ne troviĝas truoj. Ĉu vi scias, kiel la ovo-blanko kaj -flavo en la ovoŝeloj estas elprenitaj?

Prenu ovon, faru trueton (kiel eble plej malgranda sur ĝiaj du ekstretoj per maldika pinglo, pumpu aeron en la ovon per injektilo, baldaŭ la ovo-blanko kaj -flavo elfluas el la alia trueto de la ovo.

Per tio vi ricevos sendifektan ovoŝelon, tiam pentru sur ĝi vizaĝon de vi ŝatatan per oleaj farboj. Jen bela donaceto estas kompletate farita. Ni deziras al vi sukceson en tio.



# Moroj de la jugura nacio

Teksto kaj fotoj de LI QIANG

**E**N Qilian-montaro, nordokcidenta Ĉinio, vivas nacimalplimulto kun 10 000 loĝantoj — la jugura nacio. Antaŭ nelonge mi vizitis la Jugur-nacian Aŭtonoman Gubernion Sunan de Gansu-provinco.

La jugura nacio originas de la huihu-a kaj mongola nacioj de la antikva Ĉinio. Ĝi estas propra nacimalplimulto de Gansu-provinco. Antaŭe juguroj estis nomadoj. Ili loĝis ĉe akvo sur altebenaĵaj herbejoj en Qilian-montaro, ne havis fiksan loĝejon kaj vivis malfacile. Dum longa tempo ili ne havis propran nomon. En 1953 fondiĝis la aŭtonoma gubernio, kaj ili ekhavis la nomon “Jugur”, kiu signifas en la ĉina lingvo bonhavecon kaj stabilecon.

Dum la pasintaj pli ol 30 jaroj la juguroj iom post iom liberigis sin de malriĉeco kaj komencis riĉiĝi. Post veturado per aŭto sur kruta kaj malebena ŝoseo en Qilian-montaro, ni vidis la guberniurbon. Tiu loko estis nomata Hongwansi. Tie estis nur kelkaj terdomoj krom lamaisma templo. Nun la urbeto jam havas rudimentan formon. En ĝi troviĝas kelkaj larĝaj stratoj, ambaŭflanke de ili estas novaj oficdomegoj, magazenoj, kinoteatroj kaj loĝdomoj. Kvankam ili estas malpli luksaj ol tiuj de grandaj urboj, tamen ili aldonas al la urbeto multon da brilo.

La ĉefaj gvidantoj de la gubernio estas juguroj. Parolante pri ŝanĝiĝoj de la gubernio en la lastaj jaroj, ili ĉiuj sin montras tre ĝojaj. Komprenoble, en la okuloj de fremduloj la plej rimarkinda ŝanĝiĝo estas, ke ili ricevis multon da ekstera influo, tiel ke oni malfacile trovas naciajn karakterizaĵojn de la juguroj ĉu en fasono ĉu en vivmaniero. En ordinara tempo la tieaj gvidantoj ŝatas sin vesti per kadra uniformo. Nur por kontentigi la deziron de ni vizitantoj, ili laŭ la jugura kutimo portis altkoluman robon, larĝan koloran zonon, botojn kaj bulĉapelon.

Forlasinte la guberniurbon, ni veturis al juguraj loĝejoj profunde en Qilian-montaro. Turninte sin sur vojkruciĝon, baldaŭ la aŭto portis nin al altebenaĵa herbejo. Kia bela loko en la profundo de la montaro! La montoj estas ne plu krutaj, kaj la ondanta montaro estas tute kovrita de grasaj verdaj paŝtherboj. Ne plu troviĝas tervojo. La aŭto veturis laŭ sulkoj postlasitaj de bovoĉaroj sur la herbejo, kvazaŭ boato flosus sur senlima maro. Strange estas, ke troviĝas neniu bruto sur tiel bela

herbejo. La guberniestro konigis al mi, ke en varmaj tagoj oni paŝtas bovojn kaj ŝafojn en alta loko de la montoj kaj iom post iom malsupre kun malvarmiĝo de vetero, por ke ili povu havi pli longan tempon por manĝi freŝajn herbojn. Post duhora veturado supren laŭ milde leviganta deklivo, mi vidis kelkajn blankajn tendojn antaŭe.

La guberniestro diris: “Antaŭe juguroj loĝis en tendoj teksitaj el bovharoj kaj ŝaflano, sed la tendoj ne povis ŝirmi ilin de vento kaj pluvo. Nun plejmulto de la juguroj loĝas en domoj el brikoj. Nur dum paŝtado ili loĝas en blankaj tendoj sur montoj.” Ni venis antaŭ tendon kaj ĝia mastro eliris bonvenigi nin. Reciproke nin salutinte, ni eniris en la tendon. La tendo estis simple meblita per ĉiutagaj bezonaĵoj. La mastro prezentis al ni teon. La guberniestro diris, ke regali gastojn per teo estas etiketo de la juguroj. La juguroj tre ŝatas teon. Ĉiutage ili trinkas trifoje teon kun lakto, butero, rostita faruno kaj salo, kaj prenas manĝon nur vespere. La mangaĵoj estas tre simplaj, kun rizkaĉo kaj bakita farunaĵo kiel la ĉefaj. En festotagoj ili manĝas frititan farunaĵon, farĉitajn pastobulojn kaj viandon. Por bonvenigi nin, gastojn el malproksimo, la mastro speciale buĉis grasan ŝafon kaj preparis viandon. Ĉirkaŭsidante kaj prenante ŝafajn permanojn, ni ekkonis varman kaj senĝenan karakteron de la juguroj kaj interesajn stepajn morojn.

Proksime de iu tendo mi vidis, ke dekelkaj knaboj ludas. Ili, gefiloj de paŝtistoj de la ĉirkaŭaĵo, estis atendantaj sian instruiston. Rigardante tiujn viglajn geknabojn, la guberniestro diris al ni, ke pasintece la juguroj faris edukon nur en preĝejoj. En la 40-aj jaroj fondiĝis elementa lernejo, kiun vizitis nur gefiloj de riĉuloj. Profunde en Qilian-montaro paŝtistoj loĝas tre dise, kio kaŭzis multajn malfacilojn al eduko. Tiutempe ĉevalo algalopis de malproksime. Mi sekvis la geknabojn bonvenigantajn la homon rajdantan sur la ĉevalo. Li estas ilia instruisto. Mi premis liajn manojn, kaj en mi naskiĝis admiro.


La instruisto diris al mi, ke nun la juguroj vivas riĉe kaj havas bonajn kondiĉojn por disvolvi la edukon aferon. Ili konas la gravecon de scioj, tial ili sendis siajn gefilojn al lernejoj malgraŭ ĉiaj malfaciloj. Tie la instruista vivo estas nefacila. Ĉiutage li devas rajdi longan distancon. Por klerigi la junan generacion, li volonte tion faras. Dirinte, li ekridis. ■



Tendoj, kie lernas geknaboj

Teksado de tolo por tendo

Jugura knabino





LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (17)

# Regiono Dianchi

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN



Dianchi-lago

**V**ETURINTE sudokcidenten de Qujing laŭ la vojo Wuchidao, oni atingas la pitoreskan Dianchi-lagon.

La regiono Dianchi meze de la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo estis lulilo de Dian-kulturo, komerca centro kaj granda poŝtstacio sur la silka vojo en la antikveco. Kaj nun ĝi estas ŝidejo de la ĉefurbo de Yunnan-provinco kaj ankaŭ unu el la pordoj kondukantaj al landoj de la sudorienta Azio.

## ĈE DIANCHI-LAGO

Dianchi-lago kun perimetro de 250 km estas la plej granda lago sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo. Tie la verda akvo krispiĝas kaj la delikata nebulo abundas. La Okcidenta Monteto en formo de dormanta belulino kuŝas ĉe la lago. Kun la ĉielo kiel fono, kun ombro sur la verda lago, ĝi aspektas gracia. En serena tago sur la lago navetas velboatoj, aŭdiĝas fiŝistaj kantoj de tempo al tempo kaj la akvosurfaco karesas la ĉielo kun nubetoj ĉe la horizonto. Kiel bela estas la loko! En la urbo Kunming ĉe la lago ĉiam regas agrabla klimato, kvazaŭ daŭrus eterna printempo. Kaj la kampoj vestiĝas ĉie per

verdaĵo.

Dian-regno fondiĝis en la 6-a jc a.K. kaj pereis en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.—24 p. K.). Nun, kvankam mankas al ni rakontoj pri la regno-fondiĝo kaj anekdotoj pri la reĝa familio, tamen la popolanoj kreis brilan kulturon, kiu forte influis la najbarajn lokojn. Samtempe la kulturo de la landinterno de Ĉinio kaj tiu de Sud-Azio kunfandiĝis ĉi tie, kio faris la tiean kulturon kaj enhavoriĉa kaj brila.


Shizhai-monto, alinome Jingyu-monto, kuŝas okcidente de la guberniurbo Jinning sub Kunming, tuj ĉe Dianchi-lago. Tie estis la antikva landinterno de Dian-regno. Sur la monto dislokiĝas tomboj de reĝaj familianoj. Post 4 grandskalaj arkeologiaj elterigoj, oni ordigis 50 tombojn kaj elterigis 4000 historiajn objektojn. Dank' al siaj delikata arto kaj originala nacia stilo la restaĵoj faris sensacion ĉe la eksterlandaj arkeologoj. Ĉie en la tomboj de la reĝoj de Dian-regno sur la monto troveblas aŭtentikaj materialoj pri la fruperioda komerco en Yunnan. La bronzaĵoj kaj aliaj objektoj, kiaj jadaĵoj, agato, turkiso kaj konkoj, prezentas la kontaktigon

de la regno kun aliaj regionoj. Iuj dekoraciaĵoj estis portitaj en la regionon Dianchi laŭ la Suda Silka Vojo antaŭ la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Tie estas elterigitaj pli ol 149000 konkoj kun totala pezo de 400 kg. Ili plejparte estis tenataj en bronzaĵoj kaj metitaj kun aliaj moneroj ĉe la kapo de tombokuŝanto. En la okuloj de la tieaj loĝantoj la entombigitaĵoj montras la riĉecon de la mortinto. Monkonkoj estis malkovritaj ĉie ĉe la Suda Silka Vojo. En la regiono Dianchi, grava komerca loko, oni elterigis plej multe da monkonkoj.


Iu elterigita bronza lameno vidiĝas la uzadon de konko kiel monero. La lameno surhavas bildon de tigrokapo kun unu konko sub ĝi kaj tiun de leopardokapo kun du konkoj sub ĝi. Tio signifas, ke unu tigro kostas unu aŭ 10 konkojn kaj unu leopardo — 2 aŭ 20 konkojn. Post Tang- kaj Song-dinastioj (618-1279), la kalkul-metodo de la Yunnan-aj monkonkoj ekhavis sian propran sistemon. Dianchi-lago ne produktas konkojn. Dum pli ol 2000 jaroj de la Militantaj Regnoj ĝis la fino de Ming-dinastio (1368-1644) kaj la komenco de Qing-dinastio (1644-1911), la konkoj, ŝipe transportitaj el la varmakva regiono de Hindio kaj okcidenta Pacifiko, estis uzataj kiel moneroj. Kaj nun ili servas kiel atesto pri la komercado farita de diversaj nacioj laŭ la Suda Silka Vojo.

## ANTIKVA BUDHISMA ŜTONKOLONO EN DIZANG-TEMPLO

El la ruino de Dizang-templo en Kunming estas elterigita antikva budhisma ŝtonkolono de Dali-regno (937-1094 p.K.), rara gravurita artaĵo pri la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Hindio. La giganta ŝtonkolono havas sur si skulptitajn budhismajn glosolaliojn kaj bildon de la Budho, kiu gvidis siajn disĉiplojn en subpremado de demonoj kaj diabloj. Sur la bildo vidiĝas ankaŭ figu-







La tombo de ĉina komponisto Nie Er ĉe Dianchi-lago

Dongsi-pagodo en Kunming, konstruita en Tang-dinastio (618-907)



roj de budhoj, bodisatvoj kaj atletoj.

La ŝtonkolono estis starigita de Yuan Douguang, la ĉefministro de Dali-regno, por laŭdi Gao Mingsheng, la forpasintan, plej altan administratoron de la regno. Ĝi, pagodforma, sepetaĝa kaj okangula, el 5 sabloŝtonoj, altas je ok metroj. Sur la kolono estas gravuritaj 300 figuroj de budhoj de sekreta sekto, bodisatvoj kaj ĉielaj dioj de budhismo. El ili la plej granda altas je 1 metro kaj la plej malgranda je malpli ol 3 cm. La statuoj estas ĉiam laŭdataj de en- kaj eksterlandaj fakuloj kiel eminentaj artaĵoj de Yunnan. En Ĉinio nun troviĝas ĉ. 600 ŝtonkolonoj, faritaj antaŭ Ming-dinastio, sed neniu el ili estis tiel enhavoriĉa kaj belaspekta, kiel la supre menciita. La soklo de la ŝtonkolono havas formon de tamburo kaj portas reliefon de ok drakoj. Drako estas unu el la ok ĉielaj dioj de budhismo. Ĉiu paro da drakoj veste kruciĝas kaj unge premas unu la alian, kune ludante kun unu globo. La statuoj sur la kolono estas vicigitaj

vertikale kaj sidas unuj super aliaj, alkroĉiĝante al Sumerumonto, de maro al ĉielo; rigardate de horizontale, ili viciĝas laŭ Mandra-maniero de vajradhatuo de la sekreta sekto de budhismo. La ŝtonkolono efektive servas kiel Mandra-altaro de la sekreta sekto de budhismo.

La ĉinaj kaj sanskritaj vortoj gravuritaj sur la ŝtonkolono kongigas, ke Dianchi-regiono faris negocon kaj interŝanĝon de budhisma kulturo kun la najbaraj landoj siatempe. Kiel trafika centro, Kunming ludis gravan rolon tiuflanke. Kompreneble, la statuoj sur la ŝtonkolono portas ankaŭ trajtojn de Yunnan, ekz., la ĉiela reĝo portas orelingojn kaj sandalojn kaj la budha patri-no estas sur la plej honora loko.

Dank' al ekfunkcio de la Suda Silka Vojo la regiono Dianchi servis ne nur kiel fenestro de ekonomia, kultura kaj religia interŝanĝo, sed ankaŭ kiel trafika centro por ligiĝi kun aliaj lokoj. En la antikveco tie estis Butouvojo, kiu komenciĝis de Kunming, transiris Yuanjiang-

riveron sude kaj finiĝis ĉe la nuna Vjetnamio, kaj Yongguang-vojo, kiu komenciĝis de Kunming, trairis la nunan Guangxi sudoriente kaj finiĝis ĉe la marbordo. Nun la Yunnan-Birma Ŝoseo, Ĉina-Hinda Ŝoseo kaj ankaŭ Yunnan-Vjetnama Fervojo ĉiu komenciĝas de Kunming. Ili interligas Ĉinion kaj diversajn landojn de Hindoĉinio

## RAKONTO PRI AŝMA

En Lunan-gubernio 120 km sudoriente de Kunming sterniĝas mondfama karsta ŝtonarbaro. En la vastega arbaro el ŝtonaj montpintoj, muroj, burĝonoj, kolonoj kaj stalagmitoj alte staras ŝtonpinto simila al ĉarma knabino kun ornamaĵoj sur la kapo kaj bambua korbo sur la dorso. La lokanoj nomas ĝin Ŝtonstatuo de Aŝma.

Aŝma estis bela sani-a knabino en legendo. Loka tirano ekŝatis kaj forrabis ŝin. Ŝia amato Ahej postkuris ŝin, informiĝinte pri tio. Dank' al sia eminenta saĝo kaj mirinda sagopafado, li elsavis




Parto de Kunming

Aŝma finfine. Kiam ili reiris hejmen ĝojplenaĵ, helpate de demonoj, la tirano ellasis inundon, kiu forportis la belan knabinon. Ŝi floris en akvego inter montoj kaj arboj kaj fine fariĝis giganta ŝtonpinto. Se vojaĝanto krias "Aŝma!" kontraŭ la ŝtonarbaro,

tuj eksonas la arbaro, kvazaŭ Aŝma aperus denove.

Oni diras, ke ĉiu sani-a knabino estas bela Aŝma. Per siaj lertaj manoj ŝi bildigis la belan naturon sur bunta brokato. Kun la disvolviĝo de turisma afero saniaj knabinoj prezentas en urboj

Tetinkejo ĉe strato







Statuoj sur ŝtona kolono en Dizang-templo

delikatajn brokatojn kaj vestojn al turistoj el diversaj partoj de la mondo. Ili starigas standojn antaŭ hoteloj kaj vendas antaŭtukojn, broditajn murtapiŝojn, belajn sakojn kaj broditajn ŝuojn. Ili salutas alilandajn turistojn en rokeca fremda lingvo, ia-

foje, per gesto konigas al ili la teknikon de brokado kaj enhavon de la desegno. Aŭskultante, la alilandanoj ĝoje elektas varojn. Kompreneble, iafoje la knabinoj marĉandas kun ili por pli alta prezo. ■

Daguanlou-parko



Ŝtona statuo de Aŝma



# Ekzota repertuaro

## “Transmaraj Moroj”

Teksto de QIAO RAN

Fotoj de WU XINHUA

**L**A Orienta Ensemblo estas artista trupo en Pekino kun internaciaj koloroj kaj originalaj trajtoj. Post sia fondiĝo en 1962, ĝi plurfoje trapasis prosperon kaj malprosperon, tamen ĝiaj ludoj kortuŝis sennombrajn spektantojn, akcelis la amikecon inter la popoloj ĉina kaj alilandaj kaj ilian kulturen interesan. En la unua printempo de la 90-aj jaroj ĝiaj artistoj de nova generacio rikoltis varman aplaudon de la ĉina kaj alilandaj publikoj kaj vekis atenton ĉe la fakuloj per sia grandskala kanto-danco “Transmaraj Moroj”.

La teatraĵo prezentis buntan artan mondon per popolaj muzikoj kaj dancoj de 32 nacioj de Tajlando, Indonezio, Singapuro, Filipinoj, Japanio, Tanzanio, Zimbabvo, Kubo, Meksiko kaj aliaj 9 landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.


Anstataŭ anonco de programeroj sur scenejo kiel oni kutime faris antaŭe, ĉi-foje prezidantoj vira kaj virina per familiara dialogo kondukis la spektantojn en artan mondon. La prologo “Beno” konsistanta el klasikaj tradiciaj dancoj de 4 landoj de Sudorienta Azio, rompita la rutinan kutimon kaj

kunigis ilin sur la komunaj orientaj artaj trajtoj de harmonieco, eleganteco kaj impliciteco. Ĝi deziris al la spektantaro feliĉon kaj faris preparon kun orientaj trajtoj por la tuta ludo. “Riz-semado” kaj “Getao” en simpla kaj gaja kantado kondukis la aŭskultantojn en interesan kampan vivon de Filipinoj. Junaj knabinoj kun girlando ĉe la kolo, portanta pajlan jupon, naive kaj entuziasme prezentis dancon “Pajla Juppo”, odorantajn fortajn vilaĝajn trajtojn. La danco kondukis la spektantojn al ĉarmaj lokoj de Havajo. Akompanate de popola muziko de Kubo, geaktoroj en festaj vestoj kun buketo kaj balonetoj en la manoj kantante kaj dancante iris al la scenejo laŭ la parteraj koridoroj kaj esprimis bondeziron al la apudaj rigardantoj. La sekvanta danco “Paradantoj” surscenigis la spektaklon de kuba karnavalo. La gaja etoso multe infektis spektantojn, kaj ankaŭ la prezidantoj de la programeroj aliĝis al la vico de la dancantoj. Pere de siaj lirikaj dancmovoj kaj ĉarmaj ornamaĵoj, la dancoj “Bastonoj” kaj “Orienta Aŭroro” kondukis la spektantojn en poezian, mitan araban medion. Muzikistoj en meksikaj

popolaj vestoj, kun diversaskalaj marimboj en la mano, ludis komponaĵon “Bruo de Trajno”. La lasta programero “Impresoj de Afrika Danco” montris la strebadon al la lumo kaj progreso de la homaro.

De la 60-aj jaroj ĝis la unuaj 80-aj jaroj la Orienta Ensemblo, ĝenerale dirite, nur imite ludis alilandajn kantojn kaj dancojn. Nun ĝiaj artistoj aspiras al pli alta nivelo. En la ludadon la artistoj enmiksas sian nacian temperamenton kaj faris pluan prilaboron kaj rafinadon al alilandaj programeroj. Tio estas malfacila arta kreado. Krom materialoj muzika kaj danca, la koreografoj devas scii ankaŭ geografion kaj historion de la koncernaj landoj. “Transmaraj Moroj” konsistas el “Kanto de Mil Insuloj”, “Ora Plaĝo”, “Pejzaĝo de Fuji-monto”, “Steloj kaj Leono” kaj aliaj 7 programeroj kun lokaj karakteroj, ĉiu el 3-5 ludoj. Ĉiu ludo estas limigita de la ĝenerala dispozicio en la tuto, tial ĉiu aparta ludo estas ne kompleta, tamen en la tuto ili impresas bele. Fakuloj opinias, ke tia ludo postulas de la koreografoj kaj aktoroj noblan moralon kaj sinoferemon por la arto kaj la kolektivo. ■





Sceno el "Beno"

Foto de LING YOUJUAN



Sceno el la japana soldanco "Fuji"



Sceno el la havaja danco "Pajla Jupo"

Sceno el la meksikia danco "Geamantoj ĉe rivero"

Foto de **LING YOUJUAN**







Sceno el la algeria danco "Bastonoj"



Sceno el la japana danco "Awa"

En kantado de kuba kanto



En kantado de la tanzania kanto "Anĝelo"



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Gardistoj kontraŭ marondegoj  
de MARIET (Nederlando)

Akvomuelejo

de MARIET (Nederlando)

